

1981 decembro

74-a jaro


n-ro 912 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Frankfurta Librofoiro: Lanço de Esperanta volumo

Vi trovos,

post la facilnumera paŭzo de la novembra numero, denove la tradician karakteron de ĉi tiu revuo. Enestas ĉiuj niaj kutimaj mankoj, preteratentoj, eraroj, maltrafoj, troigoj, pretervidoj kaj simile. Espereble, vi trovos en ĉi tiu numero ankaŭ iom el la kutimaj kvalitoj de nia revuo. La enkonduka teksto provas solvi la enigmon de la japana eldonisto "Ludovikito", kiu redonacis al la esperantistaro la plenan verkaron de d-ro Zamenhof. Ankaŭ alia teksto traktas zamenhofan temon, ĉar la numero koncernas zamenhofan monaton. Tamen, la numero ne malriĉas je informoj precipe el ekstereŭropaj landoj. Nur kelkaj libroj prezentiĝas en la recenza rubriko. Bedaŭrinde. Ni iam estis planintaj aparte ampleksan recenzo-rubrikon en ĉi tiu numero, sed tio ial ne sukcesis. Ne pro manko de tekstoj aŭ pro manko de novaj libroj. Ili abundas. Tion pruvas ankaŭ la ampleksa bibliografia rubriko "Laste aperis...". Se la redaktoro ne devus "laste malaperi" el la Oficejo pro vojaĝo, vi eble legus kelkajn pliajn prezentoliniojn en ĉi tiu rubriko. Nun: Ĝis la venonta jaro!

Enhavo

- 201 Pri eldonisto, kiu redonacas al ni la zamenhofan heredaĵon: Ludovikito – la gaja mizantropo (Ulrich Lins)
- 202 Fondita asocio en Nikaragvo
- 204 Landa agado: Televida kurso en Koreo?
- 205 Kulturo: Tra informiĝo al kulturgenaro (Baldur Ragnarsson)
- 206 Teatro: Jadwiga en la nordo
- 207 Okaze de la zamenhofa tago: La zamenhofaj supersignoj (B. Golden)
- 209 Irano: 52 rubrikoj de "Ĝavano"
- 210 Recenzoj: "Sur la vivopado" de Nicolino Rossi (Rikardo Ŝulco); "Karnavaletto" de Olivier Tzaut (Diccon Masterman); "Somermeze" de Paul Kuusberg / Alma Lekko (Klaus Schubert); "Energio" de I. de Bruin-Kooij kaj A.J.F. de Wit (Boris Kolker); "La datentransiga proceduro X.25 kun ĝenerala enkonduko pri proceduroj" de Christian Bertin (Jan Otto de Kat)
- 212 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 213 TEJO-paĝo: Seminario pri lingvaj rajtoj: Ĉu vi parolas pikarde? (Paŭlo S. Hopkins)
- 214 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 216 Indekso de la jarkolekto 74 de la revuo "Esperanto"
- 219 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio; Nekrologoj (Josef Eder, Andreo Gauder, William Alfred Gething, Nellie Hanson, C.M. Houghton, Ólafur Th. Kristjánsson, Miguel Manteca López, Geraldo de Padua, Enzo Signore, Andreo Szabó, Sándor Szalay)
- 220 Anoncetoj

La kovrilo

Inter la 5500 eldonejoj, el 72 landoj, kiuj meze de oktobro plenplenigis tiun plej vastan el librofoiroj, la frankfurtan, per siaj 285 000 titoloj, nian literaturon reprezentis nur unu: Bleicher Verlag, cetere la sola nuntempa ĉefe nemovada komerca entrepreno kiu, sekvante la paŝojn iamajn de Hachette, regule eldonas en Esperanto. Sidas la mondfama israela verkisto Efraim Kiŝon, kelksekunde ripozigante manon lacan je aŭtografado de "Elektitaj satiroj", lia ĵus aperinta esperantlingva debutlibro. Apud li staras la mastro de la eldonejo, H.M. Bleicher mem, pri kies Esperantaj libroj la sudgermana radio faris longan intervjuon. Kiom da niaj eldonejoj kuraĝos sekvi la blajheran ekzemplon, havigante al ni pliajn verkojn de vivantaj majstroj? Esperanto estis la 27a lingvo por Kiŝon. Kioma ĝi estos por Jorge Amado, Elias Canetti, Gabriel García Márquez, fratoj Strugackij, Kobo Abe. . . ?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo; tel. (061) 226-8101.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387-8288.

Ludovikito — la gaja mizantropo

SUB "Loke", tiu ĉi revuo informis en januaro 1968, ke en Japanio aperis la unua parto, 620-paĝa, de "monumenta biografio romano" pri Zamenhof kaj ke la aŭtoro ĵus finis la manuskripton de la same ampleksa dua parto. Pliajn detalojn, krom ke la verko estas japanlingva, la informo ne donis. Prisilentita estis ankaŭ la nomo de la mirinde verkema persono.

Kiam en 1971 mi venis por unujara restado al Japanio, jam aperis la tria volumo, kiu, kvankam ampleksanta denove sescenton da paĝoj, traktis la vivon de Zamenhof eĉ ne trans la komenciĝon de la nova jarcento. Mi ja sciis intertempe la nomon de la aŭtoro — Kanĵi Ito (Kanzi Itô), sed iajn klarigojn pri tiu homo, kiu dediĉis sin al la tasko kvazaŭ senfine biografii pri Zamenhof, mi ne sukcesis akiri eĉ inter la plej konataj japanaj esperantistoj. Neniu lin konis. Veninte al Japanio kun la intenco komprenigi al mi kelkajn bazajn trajtojn de ĝia historio kaj nuntempo, mi komencis malesperi, ĉu mi signife progresos en tiu penado, se jam la Esperantujo de tiu lando posedas nedeĉifreblajn misterojn.

Li insistis pri "unu sola fenestro"


Sed jen dum vizito al Kioto mi ekhavis iom pli da scio pri la nekonata sinjoro Ito. Tacuo Huĝimoto, kiun mi delonge konis, iun tagon konfesis, ke li ne nur konas tiun homon, sed ankaŭ provizas lin per materialo por la biografiego. Sekve, ŝajnis al mi tute normale peti, ke li, Huĝimoto, ebligu al mi renkontiĝon kun la aŭtoro.

La respondo, kiun peris Huĝimoto, estis neta rifuzo. Kiel mi povis pli malfrue legi nigrablanke, sinjoro Ito insistis, ke Huĝimoto restu lia "unu sola fenestro... al la esperantujo ortodoksa". Tiu sinteno ne ŝanĝiĝis ankaŭ poste, kiam venis nova informo: ke la izoligema biografo planas la eldonon de plena verkaro de Zamenhof kaj petas mian helpon por tio. Jen ŝanco, mi pensis, por negoci: Li donu al mi aŭdiencon, kaj mi promesos liveri materialojn.

Mi denove miskalkulis. Finiĝis mia restado en Japanio, sen ke solviĝis la enigmo de sinjoro Ito.

Verdire, la planon (re)eldoni ĉiujn verkojn de Zamenhof mi ne opiniis realigebla; mi ne fidis, ke ĝin kapablos plenumi iu tute sennoma esperantisto. Tamen, jam en 1973 atingis min en Germanio bela volumo, modeste nomata "kajero", de "iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof". Portante la titolon *Unuaj libroj por esperantistoj*, ĝi enhavis represon de la pioniraj broŝuroj de Zamenhof el 1887 kaj 1888. Kiel eldonejo figuris iu "Ludovikito", indiko pri kompilinto mankis, kaj nur la lastpaĝe montrita adreso de Huĝimoto supozigis al mi, ke neatendite baldaŭ komencis realiĝi la nova ambicia projekto de sinjoro Ito.

Sekvis pliaj volumoj, kiuj, de "kajero" al "kajero", estis pli luksaj (kaj pezaj) kaj havis tiel malakademiecajn titolojn kiel *Ni laboru kaj esperu!*, *Antaŭen al la laboro!* kaj *Tamen la afero progresas!*. Ili kunigis en



Ludovikito — la gaja, izoligema homo, kiu iniciatis, redaktis, presis kaj financis la gigantan eldonprojekton de la "iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof"

Fotojn liveris: Joŝihiko Suzuki (la maldekstran) kaj U. Lins.

kronologia ordo ĉiujn originalajn verkojn, artikolojn kaj leterojn de Zamenhof, kiujn la nuna generacio de esperantistoj alie disponus nur en formo de dise trov-eblaj broŝuroj kaj kolektoj — aŭ jam tute ne plu povus konsulti.

En 1978 — intertempe aperis jam kvin "kajeroj" — mi denove venis al Japanio. Mia scivolo pri la fekunda zamenhofologo estis multe kreskinta. Ne estis sekreto, ke Ludovikito identas kun Kanĵi Ito; en 1977 li ricevis la prestiĝan Ossaka-premion de Japana Esperanto-Instituto. Sed kompreneble mi devis memori la antaŭe rifuzitan rendevupeton. Fari novan provon mi hezitis, des pli ĉar en unu el la postparoloj li mem nomis sin "hontema hommalamanto" kaj deklaris: "mi, dank' al mia malaŭtentikeco, nature ne multe konas esperantistojn." Ŝajnis al mi, ke temas pri homo, kiu tute absorbiĝas per pedanta registrado de ĉiu ero en la vivo de Zamenhof, kaj ke eble la persona renkonto kun li povus modifi la admiron, kiun mi sentis por la imponaj volumoj.

"Unu el la tipe ordinaraj japanoj"

Komence de decembro 1978, en iu dimanĉa antaŭtagmezo mi promenis kun Tacuo Huĝimoto tra la kvietaj stratoj de Kioto. Ni ne havis interkonsentitan planon kaj simple babilis, ĉefe pri Esperantaj temoj. Subite Huĝimoto haltigis siajn paŝojn. Mi rigardis kaj malkovris, ke ni staris antaŭ bela dometo, kies nomŝildo indikis kiel loĝanton — sinjoron Ito. Huĝimoto sonorigis, demandis, ricevis jeson, kaj ni eniris.

La homo, kiun ni senaverte — tute kontraŭ la japana etiketo — vizitis en lia hejmo, ride akceptis la pardonpetojn kaj tuj gvidis nin al la unua etaĝo, en sian



"Ludovikito" (maldekstre) kaj "unu sola fenestro" — Kanĵi Ito kaj Tacuo Huĝimoto antaŭ tri jaroj en Kioto

laborĉambron. Mia embaraso malaperis, dum mi rimarkis, ke sinjoro Ito, mezstatura kaj sanaspekta viro 60-jara, ne nur flue uzis Esperanton, sed gaje disponigis sin al vigla interparolado.

La laborĉambro estis en bona ordo — en Japanio ne tre kutima afero por loko, kie okazas intelekta laboro. La okulon ne frapas iu polvokovrita busto de Zamenhof, leviĝanta el inter kaosa amaso da libroj kaj paperaĵoj, sed efike lokita elektra skribmaŝino. En la ĉambra

Fondita asocio en Nikaragvo

KIAM antaŭ unu jaro la usona esperantistino Julie Regal translokiĝis al Nikaragvo, ni ne povis pozitive reagi al ŝia peto pri adresoj de "aliaj esperantistoj" en tiu centra-amerika lando. Ili ne ekzistis. Anstataŭ la adresoj, UEA disponigis al s-ino Regal kelkajn lernolibrojn kaj vortarojn en la hispana, la oficiala lingvo en tiu lando. Kaj, la 8an de oktobro ĉi-jare en Managvo, la ĉefurbo, fondiĝis Nikaragva Esperanto-Ligo, kun d-ro Arturo Cuadra kiel prezidanto, s-ino Regal kiel sekretario, Steven Bergner — vicprezidanto, Sergio Dávila — kasisto, kaj Lesbia Sánchez — bibliotekisto. La nova asocio apenaŭ havas dekon da membroj, tiel ke pli-malpli ĉiu havas ian funkcion en la estraro de NEL. La ĉefa ĵurnalo de Nikaragvo — *La Prensa*, kiu ĝuas ankaŭ internacian prestiĝon — ĝis nun aperigis tri ampleksajn artikolojn pri Esperanto, unu verkitan de s-ino Regal, alian de d-ro Cuadra, trian transprenitan de usona novaĵagentejo.

Oni nun diligente lernas en Managvo. Mankas lerniloj kaj aliaj Esperanto-libroj. Helpo tre bonvenus. Ankaŭ uzitaj legaĵoj taŭgus. Vi ja scias, ke Nikaragvo ĵus travivis (kaj ankoraŭ travivas) revolucion. La adreso de NEL estas ĉe: s-ino J. Regal, Apartado 1889, Managua, Nikaragvo.



La unuaj esperantistoj de Nikaragvo (de maldekstre): Steven Bergner, Julie Regal, Arturo Cuadra (filo), d-ro Arturo Cuadra kaj Sergio Dávila.


supro, sur horizontala trabo, iom solece grupiĝas kelkaj ĉarmaj pupetoj. Sur la ligna muro estas alpinglitaj slipetoj kun la titoloj de la jam aperintaj "kajeroj" kaj — iom apartigite — de la aperontaj. Sur la librobreto mi rimarkas grandformatajn volumojn bele binditajn; ili kunigas fotokopiojn de la unuaj gazetoj, de *La Esperantisto* kaj *Lingvo Internacia*. Granda sonbenda instalaĵo mallaŭte aŭdigas klasikan muzikon, eŭropan; ĝi estas konstanta akompanaĵo de la verka kaj kompila laboro de Ludovikito.

Dum ni manĝas nudelojn, afable alportitajn de la diskreta edzino, nia konversacio alprenas pli kaj pli sekretuman karakteron. Parolante pri la unuaj Esperanto-libroj, la "inkunabloj", Ito enĵetas esoterajn demandojn kaj komentojn: "Ĉu vi ion scias pri la mistera n-ro 74?" — "Mi ne komprenas pri n-roj 6 ĝis 10." — "Oni sisteme prisilentas n-rojn 13 kaj 23." — "La praa n-ro 5 estas granda fuŝaĵo." Ofte Ito ridas elkore. Mi konstatas, ke li misgvidis la legantojn, nomante sin mizantropo, sed ke li ne troe koketis, kiam li priskribis sin kiel "unu el la tipe ordinaraĵoj japanoj".

Konfuzis lin "markoto", "haringo", "lekanto"

Bonhumore li informas pri si mem. De pli ol tri jardekoj li respondece laboras en eldonejo, kiu aperigas librojn por dentistoj. Li ne kaŝas, ke tiu laboro estas sufiĉe enspeziga. La konatiĝo kun Esperanto estis en 1959; la japana traduko de la fabeloj de Eroŝenko tiom plaĉis al Ito, ke li supozis pri ia sorĉo de la origi-

La unuaj kvin el la dek aperintaj volumoj de la plena verkaro (Vidu anoncon sur la lasta kovrilpaĝo!)



nalo. Komence li kvazaŭ baraktis kun Esperanto: Li diras, ke ĝi tute ne estis por li facila kaj daŭre konsciĝis lin pri lia neeŭropaneco; en kajero 5 li amuze priskribas, kiom lin konfuzis vortoj kiel "markoto", "haringo" kaj "lekanto". Sed iom post iom li progresis — praktike sen ia kontakto kun aliaj esperantistoj. (Kun "sinjoro fenestro", t.e. Huĝimoto, li konatiĝis nur en 1966.)

Ito tre baldaŭ tamen malkovris, precipe per la leteroj de Zamenhof, ke la lingvo entenas ĉarmojn eĉ superajn

al Eroŝenko. En 1963/64 naskiĝis la plano verki japanlingvan biografian romanon pri Zamenhof. Ito asertas, ke li verkis kaj eldonis ĝin nur por sia propra ĝuo. Verŝajne li komence esperis, ke la volumoj ankaŭ disvendiĝos, sed la neplenumiĝo de tiu espero ĉiuokaze ne malentuziasmigis lin. Nun li ironie parolas pri siaj "malpopularaj volumegoj" kaj rakontas, ke gazeta recenzisto foje prezentis la serion kiel tipan por specifa librokategorio, nome tiu de mal-furoraĵo.

Similsence, al sia kvina kajero Ito donis la subtitolon "libro por nenies tralego". Se eĉ inter 115 milionoj da japanoj apenaŭ disvendiĝis la po 999 ekzempleroj de la biografia romano, li ne povis havi iluziojn, ke la plena verkaro en Esperanto, kun eldonkvanto de same po 999, multe pli sukcesos inter la milionoj (?) da esperantistoj. Sed fakte li eldonis ĉi-lastan tute sen ia konsidero pri revenigo de elspezoj, se ni kredu pri lia propra klarigo:

"... al mia poŝo neatendite envenis eta restaĵo de la ega plusvaloro. ĝi sumiĝis pli ol mi bezonis por ameli la buŝojn de mi kaj de mia familio. tiam al mi ekaperis la deziro ke mi transdonu mian plusmonon al la estonta mondo homaranisma. sed vidante antaŭ miaj okuloj furorantan inflacion kaj jam antaŭzorgante la neeviteblan malplivalorigon en la esperata socio, mi ne volis lasi mian moneton al ia bankiero, sed decidis ĝin lasi libroforme. oni diradas kaj eĉ certigis al mi ke esperantaj libroj tre malmulte vendiĝas. do en ĉiu esperanta instituto ili ĉiam konserviĝas kun polvoj. ja, egega avantaĝo! miaj kajeroj necese povos ĝui pli longdaŭran vivon ol banalaj bankbiletoj sur la fluo de la monda inflacio. jam sentante min sufiĉe maljuna, mi trovis tiun ĉi ideon tre plaĉa."

Senprecedence, ke iu ne lamentas pri la neaĉetemo de esperantistoj, sed faras el ĝi kvazaŭ virton! Tamen, la rezulto de la malkomercista investado de Ito nepre meritas aĉeton: Jam unuarigarde la plena verkaro de Zamenhof impresas pro sia estetike agrabla aspekto; la majstraj originalaĵoj havas modernan, eĉ avangardan veston. Kaj, pli grave, Ito redaktis la tekstojn kun granda zorgemo: Kvankam li mokas pri tiuj zamenhofologoj, kies "intereso estis kolorigitaj iom tro filologie", lia editorado estas tiel senriproĉa, ke apud ĝi tute paliĝas la laboro de skrupula germano, Johannes Dietterle, la kompilinto de *Originala Verkaro*.

Konsiliĝoj kun "mia unu sola amikino"

Ne ĉio plaĉas, ekzemple la minuskligemo de "itô kanzi", kaj ankaŭ ne taŭgas la libroj por flua tralego. Sed oni devas enprofundiĝi en la volumojn por povi kompreni, kia trezorejo ili estas (kaj por ne preteratenti, iuloke, la interesan tutpaĝan klarigon pri la prezo de kafo en Eŭropo kaj Japanio dum la tempo de Zamenhof). Aparte legindaj estas la komentoj de Ito, precipe la tre personaj postparoloj. Li rakontas tie, kiel li konsiliĝas kun sia sekretariino ("mia unu sola amikino") pri redaktaj aferoj kaj kiel ŝi ĉiufoje lin kuraĝigas per sia pacienca "Kial ne?". La postparoloj

ne nur montras la erudicion de Ito, sed ankaŭ ravas per sia japaneca stilo, pri kiu ni jam supre donis ekzemplon. Li disflustras, ke li "nun kaŝe planas la iaman eksterbisan kajeron: 'korespondaĵo ludovikologia'"; li neniam diras simple, ke iu ion sendis al li, sed, ĉiam, ke "s-ro kawasaki bonvolis sendi" aŭ "s-ro waringhien bonvolis informi". Ĵus, sendante novan manuskripton al mi, Ito skribas, ke li estas certa, "ke vi povos ĝue trovi miajn erarojn dum via kontrolado", kaj petas: "bonvolu ilin ĝue korekti." La "maleŭropa monogloto", kiel li foje sin karakterizis, sen ia dubo riĉigis nian lingvon kaj kulturon per siaj "kajeroj".

Romano 5259-paĝa, verkaro 10-voluma

Intertempe kompletigis kaj la japanlingva biografio romano, per la oka volumo kaj la paĝosumo de 5259, kaj — provizore — la plena verkaro, kiu nun konsistas el naŭ volumoj kaj la volumo 1^{bis}. Kvankam Ito aludas, ke lia "poŝo jam montras sufiĉe malbonan aŭguron", li projektas ("kaŝe planas") tri pliajn "bisajn" kajerojn kaj — la duan parton de la plena verkaro, kiu entenos tradukojn. Li jam finis la manu-

skripton de "mallegenda biografio" de Zamenhof, kaj pli malfrue aperos ankaŭ la volumo *Postrikolto*, kolekto de zamenhofaj leteroj akiritaj dum la kompilado de la serio.

"Cetere, kial 'Ludovikito'?" mi demandas. La respondo estas tipa por la pseŭdo-mizantropo: "Certe, mi tiel kombinas la nomojn Ludoviko kaj Ito. Sed samtempe tio signifas ludovik-inflamon."

"Kaj kial ĉiam 'Ludoviko'?" Ito neniam parolas pri Zamenhof, sed uzas nur tiun antaŭnomon. "Per tio", li klarigas, "mi imitas la manieron de la klasika japana novelo, kie aperas nur personaj nomoj. Kaj krome li tiel iĝas pli intima al ni." Mi tuŝas la superbordiĝantan entuziasmon, kiun la esperantistoj ofte montris al la Majstro. Ito diras, ke li tute ne estas emociigema pri Ludoviko: "Kiel japano, mi ne tre bone komprenas lian religiemon. Ĉu li ne estis iom altrudiĝema homo, estante tiom konvinkita pri sia homfeliĉiga misio?" Mi demandas, ĉu Ito ne ŝatus foje iri al Eŭropo, al la lokoj, kie vivis kaj agis Zamenhof. "Ho ne, mi tute ne emas pilgrimi", li respondas kun sia infekta elkora rido.

Ulrich Lins

LANDA AGADO:

Televida kurso en Koreo?

"DUM la pasinta jaro nia Esperanto-movado rikoltis grandegan progreson, epokfaran." Tio estis unu el la komencaj frazoj per kiuj Han Moo-hyup, prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (KEA), alparolis la 13an Korean Kongreson de Esperanto, la 24an kaj 25an de oktobro ĉi-jare, en la ĉefurbo Seulo. S-ro Han atentigis preskaŭ 200 gekongresanojn, ke la ĉefa zorgo de KEA dum la pasinta jaro estis stabiligi la materian bazon de la Movado en Korea Respubliko. Li tiurilate elstarigis la akiron de propraj oficejoj por KEA mem kaj por ĝia filio en Gjunbuk. Inter la aliaj sukcesoj la prezidanto menciis la reaparon de la revuo *La espero*, unu el la plej belaj landaj E-gazetoj, kiu nun eldoniĝas dufoje jare.

Por ni, kiuj de ekstere sekvas la evoluon de la Esperanto-movado en Korea Respubliko, la ĉefa novaĵo en la parolado de s-ro Han estas la informo, ke oni tie jam faris multan laboron por lanĉo de televida kurso de Esperanto kaj por utiligo de la lingvo en la regulaj elsendoj de la ŝtata radio. Laŭ la prezidanto de KEA, oni povas atendi la realigon de tiuj du gravaj iniciatoj tre baldaŭ. Parolante pri la problemoj de la Movado en tiu lando, s-ro Han i.a. diris: "Bonvolu studi pli intense, por altigi vian lingvonivelon." Tio efektive ŝajnas esti la ĉefa problemo de Esperanto en Korea Respubliko. Ne mankas intereso pri la lingvo, centoj da gejunuloj lernas ĝin kaj entuziasme kontribuas al ĝia disvastigo. Tamen, la lingva nivelo restas malalta, ĉar la okazoj

utiligi Esperanton konversacie kun eksterlandanoj estas tre maloftaj.

Se ni povus kompletigi ĉi tiun informon pri la Movado en Korea Respubliko, necesus memori, ke tie nun atendas sian aperon du ampleksaj Esperanto-vortaroj, ke kursoj de Esperanto okazas en pluraj universitatoj kaj altlernejoj tra la lando, ke la ĉefaj alfluo al la landa Esperanto-organizaĵo venas el la vicoj de la junularo. Krome, nun ŝajnas, ke oni en Koreo jam sukcesis venki gravan problemon, kiu turmentas la




Supre: Kongresanoj atentigas la paroladon de Han Moo-hyup.

Dekstre: La parlamentano Kim Pan-sul, vicprezidanto de KEA, informis pri la 66a UK.

Movadon en pluraj aliaj landoj: la korea Esperanto-movado nun estas unueca, kompare kun la situacio antaŭ kelkaj jaroj, kiam en tiu lando malsukcese provis vivi pluraj Esperanto-organizaĵoj, kiuj konkurencis unu al la alia.

Korea Respubliko nun viciĝas inter la kvar landoj en kiuj dum la lastaj jaroj okazas plej signifaj progresoj de Esperanto. Ni celas ĉi tie ankaŭ Ĉinion, Iranon kaj Brazilon. Okulfrape estas ke tri el tiuj landoj troviĝas en Azio, kiu tiel iom post iom venkas sian ĝisnunan kvalifikon de regiono en kiu Esperanto ankoraŭ ne havis multajn firmajn punktojn. Se ni memoras la tradicie fortan Movadon en Japanio kaj la lastatempajn evoluojn en Hinda Unio kaj Pakistano, la revigliĝantan Movadon en Vjetnamio kaj Mongolio, unuajn ĝermojn en Sirio, Afganio, Srilanko kaj Tajlando, ne restas do multaj aziaj landoj en kiujn Esperanto ankoraŭ ne



sukcesis penetri. Apartan rolon ĉi-rilate ludas grupo de japanaj esperantistoj, kiuj provas sisteme helpi la progresigon de Esperanto en la plej vasta kaj plej multhoma el la kontinentoj.

KULTURO:

Tra informiĝo al kulturgenaro

ANTAŬ KELKAJ MONATOJ aperis en tiu ĉi revuo artikolo esprimanta miajn pensojn kiel pliklarigi la kulturpolitikon de UEA ("Memornotoj pri kulturpolitiko", aprilo 1981, 64-65). Tie mi prezentis tri ideojn kiel bazajn: tiujn de **nutriĝo** el etnokulturaj valoroj (ankaŭ nomebla **transpreno**), **transformo** de tiuj valoroj en novan sintezon, kaj **genaro** de originalaj valoroj surbaze de tia sintezo kunage kun kontribuoj pure Esperantaj. Tiu ideara disvolvo kondukis al provo difini koncize nian kulturpolitikon kiel manieron de internacia agado pere de Esperanto, sin bazanta sur la menciitaj valoroj cele al kreo de konscio pri "tut-homa kultura komuneco".

Pli da verkoj kiel "Enciklopedieto japana"

Mi agnoskas, ke tiu celo facile povas ŝajni neklara kaj eĉ utopia. Tamen, se ni rigardas pozitive la suman klopodadon de niaj kulturlaborantoj kiel mondvastan proceson subportatan de komuna lingvo, ni ne povas ne vidi, ke fakte temas pri kultura moviĝo ĉiam strebanta al tia senpera komunikado, kiu konstante aperigas novajn ĝermojn en la jam ekzistantaj kulturaj bazoj de ĉiu uzanto de la interlingvo. Tiuj ĝermoj estas ankoraŭ pliparte perataj el la etnokulturaj medioj: islanda esperantisto intimiĝas kun japanaj kulturvaloroj pere de kulturaj verkoj el tiu medio, kaj inverse; oriento kaj okcidento, sudo kaj nordo, ĉiam pli interkomunikas per la komuna esprimilo: Esperanto. Ĉi tiun interkonigan kulturproceson ni devas akceli, plivastigi, pliprofundigi. Pli da **kulturvortaroj** similaj al la pionira *Enciklopedieto japana* pri la diversaj kultursferoj estas kompilendaj, pli da elstaraj, reprezentaj verkoj en la naciaj lingvoj estas tradukendaj. Surbaze de tiaj kulturesprimaj konkretaĵoj ni espereble

iam vidos realiĝon eĉ de pli grandaj revoj, ekzemple, komuna **Kulturleksikono Esperanta**, verkita kunlabore de diverslandaj kulturesplorantoj. Nunstadie tamen plej urĝas verki kaj eldoni **praktikajn gvidilojn pri la landoj kaj kulturoj de la mondo**. Tiaj gvidiloj, en kiujn lingvo, estas bedaŭre maloftaj, sed ja ege bezonataj en nia epoko de plivastiĝanta komunikado kaj vojaĝado. Tiaj gvidiloj devus sisteme prezenti bazajn informojn: historiajn, naturajn, ekonomiajn, politikajn kaj kulturajn. Bazaj historiaj faktoj, simboloj, homaj kaj naturaj rimedoj, familia kaj socia strukturoj, religio kaj filozofio, belartoj kaj kulturaj atingoj, ekonomio kaj industrio, politiko kaj administrado, ludoj kaj sportoj, naciaj manĝoj, nacia lingvo kaj dialektoj, sociaj kutimoj: ĉio ĉi kun diversaj subtemoj estu la enhavo de tiuj gvidiloj. Se verkitaj de kulture kompetentaj personoj laŭ sistema koncepto, tiaj informiloj povus fariĝi tre utilaj kaj stimulaĵoj por interkultura komunikado kaj kreskigo de aŭtentikaj scioj kaj kompreno en internacia vivo. Laŭ mia kompreno nenio malhelpas tion, ke UEA rekte instigu mondscale inter la esperantistoj al verkado de tiaj kulturaj gvidiloj, proponante konsilojn kaj aŭspicion por emfazi la dezirindon de enhavo kaj temprezenta kunordigo. Sinproponintoj por verkado povus esti aŭ formale la landaj asocioj kaj eldonistoj, aŭ interesitaj individuoj; mi ja ŝatus havi kontaktojn kun tiuj pri la temo.

Mi vidas pliintensiĝantan interkulturan informadon laŭ tiaj aŭ similaj linioj kiel absolutan kondiĉon por tia transformado de etnokulturaj valoroj en la sintezon de aktiva, partoprenanta interkompreno, kiun celas la aludita kulturpolitika difino. Se ni serioze kaj plenkonscie volas praktiki la interlingvon, profiti el ĝi, montri kaj disvastigi ĝian utilon, ni devas havi la

kuraĝon ne retiriĝi en ian defendeman pozicion, sed pliintensigi nian laboron konforme al la ĉefa uzocelo de Esperanto: servi kiel interpopola kaj interkultura lingvo. Kaj ĝuste en tia kompreno, tia laboro, troviĝas la potencialo por daŭra disvastiĝado de la lingvo: la ĉinoj nun tiel fervore studas Esperanton, ne ĉar ĝi estas minoritata lingvo, sed ĉar ili konceptas ĝin kiel malfermilon al pli vasta mondo.

Edukiĝi pri la kultura mozaiko de la mondo

Kelkajn vortojn pri la nocio "tutmonda kultura komuneco" mi ankaŭ devas diri. Mi komprenas tiun esprimon antaŭ ĉio kiel **edukitan sintenon** aŭ senton, kaj certe pli tiel ol kiel ian sumon de difinitaj konkretaĵoj "mondkulture" kondiĉitaj. Temas pri la konstante dinamika deziro **informiĝi**, edukiĝi pri la komunaj kaj diferencaj aspektoj de la kulturara mozaiko de la mondo, pri la homaj kutimoj, ideoj kaj rimedoj laŭeble vaste ekster la privatecaj sferoj de individuo, gentano, nacio. Mi havas la konvinkon, ke nur en tia explorema, priamplaksa spirito eblas daŭrige labori **genere** per kaj por Esperanto. Esperanto-verkisto ne povas havi ian mezuritan koncepton pri sia legantaro, li aŭ ŝi estas verkisto "sen popolo". Por subteni sian kuraĝon, sian moralan forton por daŭrige verkadon li/ŝi devas spirite rigardi la "tutan mondon" kiel sian potencialan legantaron, simple ĉar Esperanto **estas** interlingvo, tio estas ĝia karaktero kaj tio jam estas ĝia funkcio eble pli konkrete ol iuj el ni konscias. Tia sinteno de kiu ajn kreanto en la interlingvo estas ankaŭ nepra kondiĉo por kreskigi kaj subteni **fidon** al la lingvo mem, ĝia sanpruva stabileco kaj samtempe la generaj povoj de ĝia strukturo, sen kiu fido neniue inda verko kreeblas. La deziron kaj forton por generado en

Esperanto ni devas ankoraŭ grandparte serĉi en spirita vizio — kaj ja ankaŭ en la daŭre rezultantaj konkretaĵoj. Kaj devas esti klare, eĉ por tiuj, kiuj preferas rigardi sin "praktikuloj", ke ĝuste tiel iom post iom plimultiĝas la "realaĵoj", kiuj formas ĉiam pli konkretan bazon por "realisma" laboro.

Fine, aldone al la jam menciitaj ideoj pri kulturaj gvidiloj kaj vortaroj, jen kelkaj pliaj, vokantaj konkretigon:

- Fondo de kulturaj komisionoj ĉe la landaj asocioj de UEA (jam ekzistas kelkaj, sed pliaj klopodoj farendas),
- pli aktiva informado pri la libromerkato en Esperanto sur loka nivelo (jen unu evidenta tasko de la landaj kulturkomisionoj),
- recenza revuo,
- stablo de kunlaboro inter Esperanto-kulturentreprenoj kaj naciaj (ekzemplo estas la ĵus establita kunlaboro inter la islanda kulturkomisiono kaj la Centro de Nordregionaj Landoj — Hoppo Ken Center — en Sapporo, Japanio).
- pli aktiva kunlaboro inter esperantistaj artistoj,
- adresaro de Esperantaj literaturistoj por plifaciligi interkontaktojn,
- seminario pri lingvo kaj literaturo por novaj verkistoj,
- registrado de neeldonitaj manuskriptoj de originalaj kaj tradukitaj verkoj en Esperanto,
- pli da klopodoj konigi indajn atingojn de la Esperanta literaturo en la naciaj lingvoj,
- fundamentaj manlibroj pri modernaj teknikaj kaj sciencaj temoj (pli-malpli jam survoje pere de la Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto).

Baldur Ragnarsson,
estrarano pri kulturo kaj edukado

Jadwiga en la nordo

NI NENIAM avaris pri komplimentoj por la teatra arto de la pola aktorino Jadwiga Gibczyńska kaj ni daŭre konsideras ŝin unu el la plej brilaj artistoj en la Esperanto-movado. Jadwiga ne sukcesis — estis ŝajne malhelpita de oficialaj instancoj — veni pasintjare al la Kongreso en Stokholmo. Ŝi eble tial nun elektis la nordon de Eŭropo por sia dumonata turneo kaj por sia nova triumfo.

Laŭ invito de Norvega Esperantista Ligo, kaj kun subteno de la pola-norvega interkonsento pri kultura interŝanĝo, Jadwiga gastis en pluraj norvegaj urboj inter la 6a kaj 29a de oktobro. La turneo komenciĝis en Oslo, kie la monodramo *Zamenhof* — laŭ teksto kunmetita de la aktorino mem — estis la ĉefa programero en la solena inaŭguro de la nova sidejo de NEL, la 6an de oktobro. Poste Gibczyńska vizitis la urbojn: Trondheim, Hamar, Bergen, Haugesund, Sauda kaj Bryne. En Norvegio prezentiĝis ne nur *Zamenhof* sed

ankaŭ aliaj majstraĵoj el la repertuaro de Jadwiga, *Maria Curie* kaj *Vojaĝo al verdaj ombroj*. La norvega parto de la turneo finiĝis en Oslo kun la prezento de *Maria Curie* al la studentoj de la Universitato, aranĝo preparita de Studenta Esperanto-Societo. Norvegoj skribis al ni, ke Jadwiga "provizis al la Esperanto-kluboj unikajn programojn" kaj ke en pluraj lokoj la gazetaro donis grandan atenton, ne nur al ŝia arto sed ankaŭ al Esperanto ĝenerale.

La sveda parto de la turneo ekis en Gotenburgo la 2an de novembro antaŭ E-kurso de Märta Andréasson kaj Majken Svensson. La postan tagon Jadwiga rakontis pri la pola teatro al siaj gekolegoj en Folksteatern. Similaj interparoloj okazis post aliaj prezentaĵoj en Svedio. S-ino Gibczyńska prezentis sin ankaŭ en la Urba Teatro de Kungälv kaj en la Centra Biblioteko de Gotenburgo. En tiu urbo la pola aktorino faris ankaŭ plurajn vizitojn al diversaj institucioj. Sekvis poste prezentaĵoj en la urboj Falköping, Skövde, Örebro, Västerås, Stokholmo kaj, tute en la nordo de la lando, Kramfors. En kelkaj lokoj okazis pluraj prezentaĵoj, ofte en lernejoj.

La Zamenhofaj supersignoj

LASTATEMPE la supersignitaj literoj de la Esperanta aboco ricevis ankoraŭ unu atakon fare de miscelaj reformemuloj. Tamen, post naŭ jardekoj tiuj ofte bombarditaj eroj de la alfabeto de la Internacia Lingvo montriĝis tre rezistemaj, kaj iliaj "ĉapeloj" servas kvazaŭ frapimunaj kaskoj, daŭre protektantaj la fundamentecon de nia lingvo. Malvenko ĝis nun trafis ĉiujn kritikantojn de la uzo de diakritiloj en Esperanto. Ekster Esperantujo, kontraŭe, troviĝas lingvistoj (en kies fonetikaj alfabetoj kaj transskribsistemoj abundas ĉiuspecaj super- kaj sub-signoj), kiuj laŭdas la rimedon elpensitan de Zamenhof, ĉar li tiel kreis preskaŭ perfektan fonetikan aboccon por sia lingvo. Jen la opinio de usona lingvisto, kiu havis okazon respondi kritikon kontraŭ la cirkumflekso en Esperanto:

"Al la lingvisto, kutimiĝinta okupiĝi pri fonetikaj kaj fonemikaj skribsistemoj, ŝajnas malgranda afero [la uzo de la cirkumflekso], kaj certe la avantaĝoj akirotaj (per la uzo de unuforma diakritilo kaj per unusimbola prezentado de fonemoj) devus facile superpezi iujn pure estetikajn konsiderojn."¹

De kie venis tiu inĝenia solvo de la problemo de fonetika ortografio en internacia planlingvo? Esploroj pri



Skövde (okcidenta Svedio) estas unu el la urboj, kie Jadwiga Gibczyńska rikoltis sukcesojn. La ĵurnalo "Skövde Nyheter" ilustris artikolon pri ŝia teatra arto per ĉi tiu foto, kie la aktorinon ĉirkaŭas ŝia interpretisto S.A. Jacobson (maldek.) kaj T. Gustavsson, prez. de loka E-klubo.

la origino de la supersignoj en Esperanto kondukas la serĉanton laŭ vojoj preter la klasikan Esperanton de 1887 al pli fruaj stadioj de la lingvo — la praesperanta projekto de 1881-1882 kaj la pli frua **Lingwe Uniwersala** de 1878 — kaj ankaŭ al la malpli bone konata eksperimento de la juna Ludoviko latinigi la skribsistemon de la jida lingvo, kies tradicia alfabeto estas la hebrea. Same kiel Zamenhof ne inventis la lingvon Esperanto sed ĉerpis materialon de jam ekzistantaj lingvofontoj, li elektis la vaste uzatan latinan alfabeton kaj fonetike modifis kelkajn literojn per du supersignoj, kiuj troviĝas ankaŭ en aliaj alfabetoj: la cirkumflekso aŭ "ĉapelo" (ˆ) kaj la renversita arko aŭ "hoketo" (ˇ).

Estas ĝenerale akceptite, ke la ideon uzi la renversitan arkon Zamenhof akiris de la rusa azbuko*, en kiu identa supersigno diferencigas la vokalon и [i] de la duonvokalo ѣ [j], kiam tiu ĉi estas uzata en diftongoj. Se ne ekzistas kontraŭa opinio pri la deveno de la renversita arko, la malo karakterizas la originon de la cirkumflekso en Esperanto. Waringhien² opinias, ke Zamenhof volis eviti la suprenstrekan signon (ˊ), kiun li antaŭe uzis en siaj praesperantaj projektoj, ĉar ĝi donus al lia lingvo aspekton de la pola lingvo, en kies alfabeto tiu supersigno troviĝas super kvar konsonantoj (ć, ń, ś kaj ź). Pro la sama kialo, estas supozite, ke la aŭtoro de Esperanto ne volis uzi la "pinthokon" aŭ haĉekon* (˘), ĉar ĝi estas karakteriza trajto de la ĉeĥa aboco. Tiu ĉi klarigo estas prezentita ankaŭ en *Plena analiza gramatiko*³, kiu rigardas la ĉeĥan haĉekon "returnita" cirkumflekso. La aserto de *Plena analiza gramatiko*, ke la sistemo de sonprezentado en Esperanto estis inspirita de la ĉeĥa alfabeto ne estas dokumentebla, ĉar ĝis nun neniu esperantologo povis pruvi, ke Zamenhof konis la ĉeĥan lingvon aŭ surbaze de ties alfabeto evoluigis la ortografion de Esperanto. Male, estas atestaĵoj, kiuj sugestas aliajn eblajn fontojn de inspiro.

Longa historio de la cirkumflekso

La diakritilo konata laŭ la nomo cirkumflekso en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj havas longan historion. En la helena lingvo oni nomis ĝin **perispômenê** "sinua, kurbiĝanta", kaj ĝi havis tri skribajn formojn (͂, ̓, ̈́). Super longa vokalo ĝi indikis altiĝantan-malaltiĝantan tonon; en la muzika aŭ kromata helena akcento la voĉo plialtiĝis, ne plilaŭtiĝis. La latina nomo **circumflexus**, "ĉirkaŭ-fleksita", ĝuste priskribas la formon de tiu supersigno. En eŭropaj lingvoj ĝia funkcio estas indiki jen longajn vokalojn (ekz. rumana **român**), jen diferencigi homonimojn (ekz. portugala **por** "pro" kaj **pôr** "meti, loki"). La plej vasta uzo de la cirkumflekso

* azbuko — la cirila alfabeto uzata por skribi kelkajn slavajn lingvojn, kiel la rusa, serba kaj makedona, kaj ankaŭ aliajn, neslavajn lingvojn de sovetia Azio.

haĉeko — diakrita signo de la ĉeĥa alfabeto, havanta la formon de renversita cirkumflekso (ˇ), uzata en aliaj etnolingvaj alfabetoj kaj ankaŭ en fonetikaj transskrib-sistemoj fare de lingvistoj.

super vokaloj estas en la franca lingvo: **tâche, crêpe, île, rôle, fût**. Laŭ mia scio la cirkumflekso ne estas uzata en iu etnolingva aboco super konsonantoj, sed ĝi troveblas en specialaj transskribaj alfabetoj faritaj de lingvistoj, kiel la RGW-alfabeto por transskribi la azbukojn de la makedona kaj serba lingvo, ambaŭ apartenantaj al la slava familio. Tegmentitaj konsonantoj estas jenaj: **ĉ, ĝ, ĥ, ĵ**⁴. Tamen, ĉi-specaj fonetikaj kaj transskribaj alfabetoj pli ofte uzas la haĉekon, kiu originis en la ĉeĥa lingvo, kies ortografion reformis Johano Hus en la 15a jc. Unue la supersigno estis punkto; poste ĝi akiris la formon de hoketo. Krom la ĉeĥa, aliaj alfabetoj havantaj konsonantojn modifitajn per la haĉeko estas, en la slava grupo, la slovaka, kroata kaj slovena, kaj, en la balta grupo, la litova kaj latva. Zamenhof, kiam li estis ankoraŭ gimnaziano, uzis tri pritrakitajn supersignojn, la suprenstrekon, la haĉekon kaj la cirkumflekson, en la latina alfabeto por la jida lingvo, kiam li entreprenis analizon de ĝia gramatiko inter la jaroj 1876 kaj 1879. Du dokumentoj, la originala ruslingva manuskripto kaj artikolo publikigita en jida revuo en 1909, enhavas la regulojn por la transskribo de la jida alfabeto per la latina⁵. En la manuskripto la supersignitaj literoj estas **ĉ, ĥ, ŝ kaj ž** (la ekvivalentoj en Esperanto estas **ĉ, ĥ, ŝ kaj ĵ**); la haĉeko super **ě** indikas, ke ĝi estas mallonge elparolata, kaj litero kun la cirkumflekso ne estas elparolata (ekz. la **ž** en **iž šeun** pro la tuj sekvanta ŝ-sono). En la publikigita artikolo okazis malgranda ŝanĝo. La suprenstreko ankoraŭ estis uzata super la konsonantoj **ĉ, ĥ, ŝ kaj ž**, sed nun la cirkumflekso alprenis la antaŭan funkcion de la haĉeko por indiki la "silentan **ê**" laŭ la terminologio de Zamenhof: **brikên** "pontoj"; **briken** "piedbati". Neniu aparta diakritilo signas, ke litero ne estas elparolata.

Gimnaziano en maro da supersignoj

La du praesperantaj lingvoj parte spegulas la supersignadon de la jida latina alfabeto. En **Lingwe Uniwersala**, kies sola teksto estas kvarlinia poemeto, troviĝas nur la suprenstreko super la litero **á**, indikanta, ke ties silabo ricevas la vortakcenton. En tiu mallonga verko

neniu konsonanto estas supersignita. En Pra-Esperanto 2 Zamenhof uzis tri akcentitajn vokalojn, **á, é kaj ó**, kaj signis per la sama suprenstreko kvar konsonantojn, **ĉ, ĥ, ŝ kaj ž**, kiuj poste fariĝis **ĉ, ĥ, ŝ kaj ĵ** en Esperanto. Rimarku, ke li skribis **ĝ** en tiu lingvo per la digramo **dž**. Tiutempe Zamenhof ekuzis ankaŭ la renversitan arkon super **ŭ**. Estas, do, konstateble, ke Zamenhof eksperimentis per diversformaj supersignoj ekde la komenco de sia laboro super planlingvoj kaj reformo de la jida ortografio. Li verŝajne opiniis diakritilojn same naturaj en skribsistemo kiel la literoj mem, ĉar li daŭre havis antaŭ siaj okuloj tekstojn en la pola lingvo kun supersignitaj konsonantoj kaj vokaloj, kaj en la hebrea kaj jida lingvoj kun vokalpunktoj aldonitaj al konsonantoj. Ne forgesendaj estas ankoraŭ du lingvoj, la helena kaj la latina, kiujn Zamenhof primajstris en la gimnazio. En la unua svarmas plurspecaj kromsignoj: la supren- kaj malsupren-streko, la cirkumflekso, du specoj de apostrofo por indiki la krudan kaj mildan spiriton, kaj ankaŭ la sublitera jota. Sur longaj kaj mallongaj vokaloj en la latina lingvo estas uzata la makrono (ˉ) kaj brevo (˘) respektive. En la helenromia metriko la brevo signas la neakcentitajn piedojn, kaj la suprenstreko montras la akcentitajn. Zamenhof, estante adoleska gimnaziano, naĝis en maro da diakritaj signoj.

Inspiro povis veni el la litova

Kiam la definitiva formo de Esperanto estis preta en 1887, la **ŭ** restis por plu funkcii kiel duonvokalo, sed la suprenstreko de la konsonantoj estis anstataŭigita per la cirkumflekso, kiu primitive troviĝis nur super la vokalo **ê** kaj super neparolata konsonanto en la jida latina alfabeto. Por trovi la fonton de la inspiro de Zamenhof uzi la cirkumflekson por modifi konsonantajn sonojn, ne estas necese rigardi la ĉeĥan lingvon kiel modelon⁶. Zamenhof konis ankoraŭ unu lingvon, la litovan, kies alfabeto havas tri specojn de supersignoj kaj unu subsignon. Ja estas esperantologoj, kiuj asertas, ke la aŭtoro de Esperanto ne nur sciis tiun lingvon sed eĉ uzis elementojn el ĝi en Esperanto. En la litova tri konsonantoj estas skribataj per haĉeko, **č, š kaj ž**. Mi, do, hipotezas, ke la ideo uzi en la unua tempo la haĉekon venis de la litova skribsistemo. La posta substituo de la cirkumflekso plej probable rezultis el simpla renverso de tiu signo, ĉiam kun plifortigo de la uzo de tegmentitaj vokaloj en la franca alfabeto.

Tio ne estas la fino de la historio. Ok jardekojn antaŭ ol Zamenhof disvolvis siajn jidan kaj Esperantan alfabetojn, hungara instruisto de surdmutuloj, Antal Simon, kreis fonetikan alfabeton por la hungara lingvo⁷. Li anstataŭigis digramojn en la hungara aboco per unuopaj konsonantoj havantaj du specojn de supersignoj: la cirkumflekso indikas palataligon (**ĝ, ĥ, ĵ, ĥ**) kaj la suprenstreko (**ŝ, ž**) ebligas la uzon de po unu litero por **sz** kaj **zs** respektive. Malgraŭ la diferenca prononco de la supersignitaj konsonantoj en la fonetika alfabeto de Simon, estas rimarkinde, ke liaj

Se vi mendas librojn ĉe UEA, pensu pri la sendokostoj: minimume 5,00 guldenoj; por mendoj sub 200 gld. 20 procentoj, por tiuj super 200 gld. 10 procentoj. Nederlandanoj memoru la imposton: por libroj 4, por aliaĵoj 18 procentoj. Dankon!

93 poemoj pri sufero

Sur la vivopado, de Nicolino Rossi (1939-). La Chaux-de-Fonds/Milano: LF-Koop, 1980. 112p. 24cm. Prezo: 15,90 gld.

La plaĉe aranĝita libro (bona papero, klara preso, kovrildesegno de Alda Vercesi) konsistas el tri partoj de malsama amplekso. La unua, *Ĝoje kaj sufere* (1968-1971), enhavas 55 poemojn, la dua, *Gaje kaj sufere* (1971-1974), kaj la tria, *Karme kaj sufere* (1975-1978), enhavas po 19 poemojn. Entute temas do pri 93 poemoj el dek jaroj, kiuj prezentas la plej freŝan kvaronon de la vivopado de la poeto.

Kio ekde la komenco plej multe frapas, estas la trifoje uzata vorto "sufere" en la subtitoloj kaj ĝia stranga kunigo kun "ĝoje, gaje" kaj "karme". La granda temo de tiu poemaro do estas la sufero. Tio perfekte harmonias kun la traduko, kiun Nicolino Rossi faris en 1975: *La dolore* de Ungaretti. Kio alia estas sufero ol senti doloron, ĉu fizikan, ĉu spiritan? Vortoj, kiuj ofte revenas, estas tiuj, kiuj estas formataj el la radikoj sufer', sol' kaj izol'. La poeto sentas sin izolita, sola kaj li suferas pri la vivo kaj pri ties amaraj kruelaĵoj, ĉu tiuj nun estas amdeziroj plenumitaj aŭ malesperaj, sento de anima malpleneco, obskura tristeco de la koro, pro laboristo mortigita de la polico dum manifestacio aŭ pro la patro mortinta en aŭtomobila akcidento. Vidalvide de la timigaj teruroj de la ekzisto, pri kiuj la poeto ĉiam denove kortuŝe insistas, tiuj versoj, kiuj ŝajnas pravigi la titolajn adverbojn "ĝoje" kaj "gaje" verdire nur reliefigas la suferon per kontrasto. Ĝojo kaj gajo preskaŭ neniam estas puraj, senmakulaj, ne malhelpataj.

Se oni nun pensus, ke tia legaĵo estas turmenta aŭ premega afero, oni vere erarus. Ĉi tie nome efikas io, kio verŝajne estas la sekreto de la poezio. La nekontestebla beleco de la versoj, la elstara forma forto de la poeto ŝanĝas ĉion. Pro ili la teruro fariĝas tolerebla, eltenebla. La poemoj ne afliktas. Ili konsolas. Ili ne timigas. Ili edifas. Ili eĉ provokas estetikan ĝuon.

Mi supozas, ke tre ofte, kiam io turmentas aŭ ĉagrenas la poeton, li ĝuste per sia poezia verkado, per la serĉado de la plej taŭgaj vortoj kaj esprimoj, per ilia enligo en severan versaĵan formon, per la arta mastrado kaj eleganta rimado, kiuj ambaŭ — ne povas esti alie — postulas egan mensan streĉon, sukcesis superi la amaran sperton kaj liberigi sin de ĝi, sukcesis tiel forigi la premegon kaj retrovi sian animan ekvilibron.

Kiel ĝojo kaj gajo ne estas tro malsimilaj konceptoj, tiel ankaŭ la diferenco inter la poemoj de la unua kaj dua grupo ne estas tro granda. Ĝi estas precipe formala. La unua parto komenciĝas per naŭ sonetoj, poste aperas aliaj poemoj konsistantaj el regulaj strofoj kun rimataj versoj, la sonetoj rariĝas, preskaŭ tute malape-

ras, aperas ĉiam pli ofte ankaŭ versoj blankaj, la ritmoj pli kaj pli liberiĝas, varias, sen ke la versoj perdas sian belan sonecon. La belo de la lingvo konserviĝas, fariĝas nur pli mistera, malpli travidebla por la menso.

La tria parto enhavas forte novan akcenton. La kristana mondkoncepto cedas al orientiĝo laŭ hinduismo kaj jogo. Ripetfoje aperas la vorto karmo. Samtempe — tiel almenaŭ ŝajnas — estiĝas ĉe la poeto malklara sento pri ebla sekigo de la fonto, el kiu venas lia poezia verkado. Mi ne povas ne vidi ĉi tie iun interrilaton. La mastrado de la vivo per krea agado aŭ verkado estas sufiĉe fremda al la aziaj religioj. La karmon oni eble ekkonas, sed oni ne superas ĝin per arta aŭ alia verkado.

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)

Karesaj tenortonoj

Karnavaletto. Kantas Olivier Tzaut. La Chaux-de-Fonds: LF-Koop, 1981. Gramofondisko (30cm, 33t/m) aŭ kaseto 34-minuta. Dek kantoj tradukitaj kaj originalaj, de Claude Piron k.a. Kun tekstoj. Prezo: 25,80 (kaseto); 31,80 (disko) gld.

Mi konfesu tutunue mian antaŭjuĝon: kiam mi unuafoje aŭskultis Olivier Tzaut en lia svisa patrolando, lia muziko tre plaĉis al mi, kvankam temis nur pri simpla, gitare akompanita kantado.

Sekve de lia antaŭa registraĵo *Tra l' mondo* (disko kaj kaseto, ankoraŭ haveblaj), jen nun pretiĝis plengranda gramofondisko kun dek kantoj el diversaj mondopartoj, plejmulte tradukoj de Claude Piron plus du pironaj originalaĵoj, kun akompanado de gitaroj, perkutinstrumentoj, vibrafono, mandolino, orgeno, kiuj pliriĉigas la muzikon kaj la vortojn de la kantoj per bona registrado.

La tuton kunkudras la fadeno de la karesaj, mielsonaj tenortonoj de Tzaut. . . kaj tiel enstringiĝas mia sola tamen: ke tiu bela, klarvorta voĉo, kiu perfekte taŭgas — ekzemple — por "La tri sonoriloj" ne povas sufiĉe raŭkiĝi por esprimi la polvovoĉajn venĝosentojn de la sudaŝrika negro en "La diamantministro". La elekto de la kantoj mem devus pli harmoniiĝi kun la gamo de la voĉo.

Tiu kritiko ne forĉasu vin. Tiu ĉi disko estas unu el la bonaj esperantlingvaj muzikaĵoj. Ĝi estas havinda.

Diccon Masterman (Britio)

Multvidpunkta libro

Somermeze (1966), de Paul Kuusberg (1916-). El la estona trad. Alma Lekko. Tallinn: Eesti Raamat, 1981. 358p. Ilus. 17cm. Prezo: 13,80 gld.

Ni ne ekscias, ĉu Olev mortos. Somero 1941, la armeo de Hitler estas konkeronta Tallinn. Ni forlasas Olev, kiam li pretas morti.

La romano, kiu kondukas sian heroon al ĉi tiu morna punkto, tamen ne estas pesimisma. Ĝi montras la

konscian evoluon de Olev, tre juna laboristo, ekde la tago, kiam Ruutholm, lia pli aĝa amiko kaj estro, persvadis lin fariĝi junkomunisto. Kiel membro de estona civilula batalgrupo Olev implikiĝas en militon ne nur inter fremdaj armeoj, sed inter estonoj: Unuj esperas per germana helpo resendependigi Estonujon el Sovetunio, kies parto ĝi fariĝis jaron antaŭe, kaj aliaj per rusa helpo defendas sian hejmlandon kontraŭ la faŝismo. Ni rigardas per la okuloj de Olev, spertas liajn necertecon, dubon, timon, abomenon mortigi, vidas ankaŭ kiel li lernas batali, mortigi homojn. Tamen li neniam fariĝas ardblinda militheroo. Olev ricevas ordonojn, ne havas superrigardon, ne parolas la rusan, ne komprenas. Kun li ni ekkonas homojn, miskomprenas kaj seniluziiĝas pri kelkaj.

Apud Olev ĉiam staras Ruutholm kiel firma, politike decidinta kaj aktiva gvidfiguro, tamen ne centprocen-
ta, sed homo kun duboj, ne kruela. Kvazaŭ aliflanke de Olev figuras Elias, kiun denuncio igis arestota de la samideanoj de Olev. Elias fuĝas ĝustatempe, stumblas en la batalojn kaj sur la flanko de kontraŭkomunistaj partizanoj trudakceptas fusilon. Post ŝanceliĝado inter la frontoj, malamikiĝinte kun ĉiuj batalpartioj, li reiras al Tallinn, ne plu trovas sian amikinson, la lastan de kiu li esperis komprenon, kaj sin mortigas.

Tiel la evoluo de Olev staras inter du polusoj: samideano de Ruutholm, li tamen fine elektas la vojon de Elias (ankaŭ li post lasta provo trovi la amikinson) kaj iras batali por la ideo, pri kiu li ĉiam pli konvinkiĝas.

En romano pri la Dua Mondmilito oni dekomence scias, kiuj staras sur la venkonta flanko, tamen Kuusberg ne eluzas tiun poenton por sia heroo: li montras la Ruĝan Armeon nur retiriĝanta, kaj ĝia lasta ago estas decida seniluziigo por Olev. La armeo forlasas Tallinn, kies defendado do estis nur taktika subteno al la fora, rusa Leningrado.

La traduko de Alma Lekko estas ĝueble flua kaj viva, nur la lokado de "ne" misa. Mankas nur mapo.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Lerni pri energio

Energio. Kompilis I. de Bruin-Kooij kaj A.J.F. de Wit. Almelo: Federacio de Esperanto-organizoj en Nederlando, 1981. 62p. Ilus. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Kiuj mondskalaj problemoj, krom la lingva, interesas esperantistojn? Se oni juĝas laŭ la temoj de esperantistaj kunvenoj, libroj kaj gazetaro, certgrade la mondpaco, iomete la diskriminacio kaj protektado de vivmedio. Pri la cetero en Esperantujo oni skribas aŭ parolas, des pli diskutas, tre malmulte. Sed estas ja konate, ke ne eblas vivi en la socio kaj esti libera de la socio.

Do la problemo de energio finfine ekinteresis ankaŭ esperantistojn. Ĝi fariĝis eĉ centra temo por Nederlanda Esperanto-Kongreso en 1981, kie esperantistoj diskutis ĝin kun reprezentantoj de politikaj partioj.

Malofta fenomeno! Kiel enkonduko de la diskuto estas eldonita ĉi tiu broŝuro. En facile digestebla lingvaĵo ĝi priskribas la fosiliajn specojn de energio (nafto, gaso, karbo), la atoman kaj la alternativajn: sunan, ventan, termikan, akvan, tajdan. Oni konsideras malfacilaĵojn kaj danĝerojn, ligitajn al utiligo de diversaj energi-fontoj, donas informojn kaj konsilojn pri energi-ŝparado.

La broŝuro bone plenumas siajn taskojn — informan kaj diskutigan. Certan intereson ĝi havas ankaŭ el la terminologia vidpunkto.

Boris Kolker (Soveta Unio)

Lingvo por komputiloj

La datentransiga proceduro X.25 kun ĝenerala enkonduko pri proceduroj, de Christian Bertin. Liège: Someraj Universitataj Kursoj, 1980. 133p. 30cm. KJ 04. Prezo: 22,40 gld.

La fakto, ke la komputilo ludas ĉiam pli gravan rolon en la socio, estas sufiĉe konata. Tamen, de tio ni ankoraŭ ne rimarkas tiom en la ĉiutaga vivo. Krom la etaj poŝ-kalkuliloj kaj ia aŭtomata financa administrado, la komputilo ankoraŭ ne sin montras publike. Sed malantaŭ la kulisoj oni arde laboras, kaj en antaŭvidebla tempo la homoj estos supersutataj per mirindaĵoj, kiujn multaj el ni ankoraŭ nun opinias neblaj.

Por bona funkciado de tia sistemo sufiĉe komplika komputil-lingvo estas bezonata, tiel por la komunikado de homoj kun la centraj komputiloj, kiel por la komunikado inter komputiloj mem. La publiko nenion rimarkas el tio: oni nur bezonas premi butonojn, kiujn la komputilo mem eĉ indikas! Sed la inĝenieroj, kiuj devas kompili la sistemon, kompreneble devas scii la lingvojn de la komputiloj. Multajn tiajn lingvojn oni jam uzas, sed, same kiel pri la etnaj lingvoj, oni ankaŭ pri tio strebas al internacie aplikata lingvo, por ke komputiloj en diversaj landoj povu komuniki senĝene.

Tia lingvo estas la rekomendo X.25. La priskribo de Bertin estas tre kompleta kaj destinita nur por tiuj, kiuj iomete spertiĝis pri tia temo. Ne povas ne esti, ke en tia verko troviĝas novaj vortoj por esprimi novajn ideojn. Bertin sekvas la rekomendojn de Eichholz. Troviĝas en la teksto relative multe malpli da anglismoj, ol estas kutimo en, ekzemple, similaj nederlandaj tekstoj, kaj tio estas ĝojiga. Mi ne volas diri, ke anglaj vortoj ne sufiĉus, sed estas grave, ke oni gardu la karakteron de la lingvo Esperanto (kaj tio validas por ĉiu lingvo).

Nur kelkajn vortojn mi opinias malpli trafaj: **runi**, **seti**, **hardvaro** (angle: *to run*, *to set*, *hardware*) por kiuj tamen estu troveblaj pli konvenaj Esperantaj vortoj. Ankaŭ la terminon **komputilo** mi opinias (kun ekz. Münnich) pli bona ol **komputero**, ĉar **ero** jam estas sufikso, kaj fakte temas pri ilo. La samo validas por **kuplero**. La anglaj sufiksoj *er* kaj *or* ofte havas la

signifon de ilo. Tre bone trovitaj ŝajnas la vortoj: **kompti, krementi, tempumilo** kaj multaj aliaj. Utila glosaro el cento da vortoj troviĝas sur la lastaj paĝoj. La libro estas tre grava plivastigo de la Esperanta fakliteraturo. Estas ĝojige, ke sciencistoj, kiuj okupiĝas pri la modernaj fakoj de la scienco kaj tekniko de la estonteco pliriĉigas Esperanton per siaj aldonoj. Denove laŭdon por Someraj Universitataj Kursoj, pro ebligo kaj bonega prizorgo de la eldono.

Jan Otto de Kat (Nederlando)

Laste aperis . . .

Anekdotoj pri gabrovanoj. Red. G. Dolapčiev. El la bulgara tr. N. Janev. Gabrovo, 1981. 28p. 19cm. Ŝercoj ĉefe pri la legenda avaro de loĝantoj de la bulgara urbo Gabrovo. Prezo: 1,80 gld.

Ärztlicher Dolmetscher. Red. Gert kaj Uta Hoyer. Leipzig: Johann Ambrosius Barth, 1980 (2a eld., pligrandigita). 316p. 22cm. Bindita. 17-lingva medicina frazaro (angla, araba, bulgara, ĉeĥa, Esperanto, franca, germana, greka, hispana, hungara, itala, pola, rumana, rusa, serbokroata, sveda, turka). Prezo: 30,60 gld.

Bibliografija prijevoda djela hrvatskih pisaca na Esperanto, Marinko Gjivoje (1919-). Zagreb: Kronika (JAZU), 1981. 36p. 24cm. Bibliografio de tradukoj el la kroata en Esperanton. Prezo: 3,60 gld.

Bonhumoraj piloloj, Ergoto de Bonaero (ps. de Adán Hryniewicz, 1931-). Bonaero: Argentina Esperanto-Instituto, 1981. 64p. Mimeo. 17cm. 33 amuzaj anekdotoj kaj dialogoj. Prezo: 9,00 gld.

Burgoj kaj kasteloj; Albumo de sudbohemiaj historiaj memorindaĵoj, unua kajero. Kompilis Irena Papírníková. České Budějovice: EK La Progreso, 1980. 41p. Ilus. de B. Kozel. Utila gvidlibro por turistoj. Prezo: 3,00 gld.

Ĉielo kaj la infero, La (1865), Allan Kardec (1804-1869). El la franca (laŭ portugala traduko) tr. A.K. Afonso Costa kaj Benedicto Silva. Rio: Federação Espírita Brasileira, 1981. 420p. 18cm. Detala priskribo de la postmorta vivo, kun atestaĵo de elkarniĝintoj en diversaj etapoj de spirita evoluo. Prezo: 10,80 gld.

Eklegu komencanto. Red. J.P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1980. 9p. Ilus. de M. Bieliński. 21cm. Kvar simplaj fabeloj. Prezo: 1,80 gld.

Esperanto; The solution to our language problems / La solvo de niaj lingvaj problemoj. Red. Rüdiger (1922-) kaj Vilma Sindona (1926-) Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1981. 472p. Ilus. 21cm. Kartonita. Dulingva (angla-Esperanta) kompilaĵo el diversaj fontoj, precipe la serio *Esperanto-dokumentoj*. Prezo: 39,00 gld.

Fundamento de taktiko kaj strategio en go-ludo, M. Emori. Esperantista Go-Ligo Internacia, 1981. 6+193p. Ilus. 21cm. Esperanta Go-Serio 2. Por tiuj, kiuj jam konas la ludon (vd. *Invito al go-ludo*). Prezo: 32,40 gld.

Hajka antologio. Red. M. Miyamoto kaj M. Ueyama. El la japana tr. Hajkista Klubo. Kioto: L'Omnibuso, 1981. 220p. 17cm. Ekzemploj de la konata japana poemformo, ekde la 15a jarcento ĝis hodiaŭ. Prezo: 18,60 gld.

Internacia kemio-vortaro, Manfred Westermayer. Tübingen: La aŭtoro, 1981. 8+71p. 21cm. 3400 terminoj, alfabeto aranĝitaj, kun tradukoj al la angla kaj la germana. Prezo: 12,60 gld.

Internationales Chemie-Wörterbuch, Manfred Westermayer. Tübingen: La aŭtoro, 1981. 8+85p. (nenumeritaj). 21cm. Sama enhavo kiel *Internacia kemio-vortaro* de la sama aŭtoro, sed kun alfabeto aranĝo laŭ la germanaj terminoj. Prezo: 10,20 gld.

Kapricaj raketoj, Carmel Mallia (1929-). Zabbar: La aŭtoro, 1981. 46p. (nenumeritaj). 14cm. 92 mallongaj, ofte filozofiaj poemoj. Prezo: 6,60 gld.

Katalogo de Esperanto-periodaĵoj ĉe Universitata Biblioteko de Katolika Universitato en Lublin, Anna Grabowska kaj Edward Wojtakowski. Lublino/Romo: Biedulski, 1981. 3+87p. 15cm. Mozaiko 2. Pli ol 450 titoloj, inkluzive kelkajn en planlingvaj projektoj. Indeksoj laŭlanda kaj laŭtema. Prezo: 7,50 gld.

Krabo kun oraj pinĉiloj, La (1941), Hergé (ps. de Georges Rémi). El la franca tr. Hervé Gonin. Bruselo: Casterman, 1981. 62p. Kolorilus. 30cm. ISBN 2 203 01001 0. Bindita. Aventuro de la fama bildstria heroo Tinĉjo, entreprenema raportisto, kiu, kun la kapitano Hadoko kaj la hundo Miluo, ĉasas monfalsistojn. Prezo: 13,20 gld.

Lingva problemo de la movado de nealiancitaj landoj, La — Kelkaj rekomendoj, Tibor Sekelj (1912-). Rotterdam: UEA, 1981. 12p. 21cm. ED-13E. Prezo: 3,00 gld.

Londono vokas; Historio de la Londona Esperanto-Klubo 1903-1978, Harry Holmes. Londona Esperanto-Klubo, s.j. (1981). 131p. Ilus. 21cm. Pri 75-jara vivo de unu el la plej konataj lokaj Esperanto-klubo. Prezo: 15,00 gld.

Malvasta kaĝo, V. Eroŝenko (1890-1952). Red. Yositaka Mine. El la japana tr. Masao Miyamoto. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1981. 87p. 18cm. Unuafoje en Esperanto, kvar originale japanlingvaj fabeloj de Eroŝenko. Ankaŭ ties esperantigo de la bahaa klasikaĵo *Kaŝitaj vortoj*. Prezo: 14,10 gld.

Medalionoj (1957), Zofia Nałkowska. El la pola tr. Tadeusz Hodakowski. Warszawa: PEA, 1979 (fotorepreso). 112p. 17cm. Pri la suferoj de poloj sub nazia rego. Prezo: 4,80 gld.

Mediteme, Oldřich Kníchal (1939-). Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1980. 73p. Ilus. 20cm. Noveloj kaj eseoj, inkluzive studon pri *Kiel akvo de l' rivero* de Schwartz. Sep originalaĵoj kaj kvar tradukoj el la ĉeĥa. Prezo: 3,90 gld.

Ni kantas. Red. Ludwig Schödl. Berlin: Centra Laborrondo Esperanto, 1980. 58p. 21cm. 49 kantoj, inkluzive batalkantojn, popolkantojn (germanajn kaj internaciajn) k.a. Kun muziknotoj. Prezo: 9,90 gld.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto (1970). Ĉefredaktis G. Waringhien (1901-). Paris: SAT, 1981 (senŝanga represo de la dua eldono). 37+1303p. Ilus. de E. Støp-Bowitz. 20cm. Bindita. Aŭtoritata, la plej ampleksa vortaro de la Internacia Lingvo; tridek paĝoj da ilustraĵoj. Enhavas multajn sciencajn kaj teknikajn terminojn. Prezo: 135,60 gld.

Schleyer: Johann Martin Schleyer (18. Juli 1831 — 16. August 1912); Ein Lebensbild (1914), Albert Sleumer (1876-1964). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981 (fotorepreso). 42p. 16cm. Pri la aŭtoro de Volapük. Germanlingva, en frakturliteroj. Postparolo de R. Hauptenthal. Prezo: 9,00 gld.

Slovaka antologio (1977). Elektis Jozef Vel'ký. Redaktis M. Šaturová-Seppová. El la slovak. Bratislava: Slovaka Pedagogia Eldonejo, 1980 (2a eld.). 528p. Ilus. 20cm. Bindita. Preskaŭ 90 aŭtoroj, ekde la 9a jarcento ĝis nuntempo, en traduko de i.a. Jiří Kořínek, Miloš Lukáš kaj Eduard V. Tvarožek. Prezo: 18,00 gld.

Taschenlehrbuch Esperanto, Till Dahlenburg kaj Peter Liebig. Leipzig: VEB Verlag Enzyklopädie, 1981 (2a eld., reviziita). 266p. Ilus. 18cm. Bindita. Plena lernolibro, lerte aranĝita. Prezo: 10,50 gld.

Tutmonda esperantista adresaro 1981. Marburg: Info-Servo r.a., 1981. 8+214p. 15cm. Listigas ĉ. 2700 adresojn laŭ lando kaj urbo, kun detaloj pri aĝo, preteco korespondi, profesio, hobioj k.s. Prezo: 11,40 gld.

Vereco, distro, stilo; Romanoj en Esperanto, William Auld (1924-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981. 101p. 20cm. Kritiko pri ĉiuj kvindek originalaj Esperantaj romanoj, ekde *Kastelo de Prelongo* (1907) de Vallienne ĝis la lastaj verkoj de Boatman, Lorjak, Miyamoto, Rosbach, Valano kaj Francis. Prezo: 21,30 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj — 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj — 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

SEMINARIO PRI LINGVAJ RAJTOJ:

Ĉu vi parolas pikarde?

EN LILLE, kiu situas en norda Francio, en regiono kie la pikarda — forgesita latinida lingvo — ankoraŭ klopodas pluvi, inter la 19a kaj la 26a de septembro 1981, okazis komuna seminario de TEJO kaj Pikarda Somera Popoluniversitato. En la kadro de la seminario, ĉ. 20 gejunuloj (el naŭ landoj) kaj pluraj fakuloj pridiskutis la temon "Lingvaj kaj komunikadaj rajtoj kiel homaj rajtoj". Post enkonduka parolado de la loka organizanto Alain Dawson, prof. Michel Duc Goninaz diskutigis la partoprenantojn per la prelego "Lingva libereco kaj rajto je komunikado: ĉu diverĝaj celoj?". Li ekzamenis la bazan teorion de tiuj rajtoj. Dum la sekvaj tagoj estis multaj prelegoj pri diversaj aspektoj de la temo: András Lukács parolis pri soci-politikaj aspektoj de la amaskomunikado kaj pri la neceso kunlabori kun internaciaj junularaj organizaĵoj; Kristin Tytgat raportis pri la lingva situacio de Eŭropa Komunumo; Hans Bakker parolis pri la uzo de lingvo en la subpremado de etnaj minoritatoj; André Lévêque (prezidanto de Chti qu'i Pinse — Pikarda Somera Popoluniversitato) prezentis minoritatajn latinidajn lingvojn en Francio; Yvo Peeters (ĝenerala sekretario de Asocio Internacia por la Defendo de Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj) prelegis pri la neceso emfazi kolektivajn lingvaj kaj komunikajn rajtojn; Gérard

Minet (prezidanto de la loka sekcio de la Ligo pri Homaj Rajtoj) emfazis en sia prelego la gravecon de individuaj lingvaj kaj komunikaj rajtoj. Fine, Jean-Paul Marmin parolis pri la lingvaj problemoj de gastlaboristoj en Francio. François Lo Jacomo, por fini la prelegadon, prelege konkludis, ke prelegado ne estas tre taŭga maniero komuniki kun aliaj.

La seminarianoj ne nur diskutis inter si sed ankaŭ prezentis sin al la publiko, i.a. dum akcepto en la urbo-domo kaj ĉeesto en la oficiala malfermo de ekspozicio pri Esperanto en la urba biblioteko de Lille. Dum unu el la du vizitoj al la Libera Radiostacio de Lille, Alain Dawson gvidis intervjuprogramon, dum unu horo kaj duono, interparolante kun pluraj seminarianoj. Okazis ankaŭ gazetara konferenco kaj vespero por la loĝantoj de la Restadejo de Junaj Laboristoj, kie okazis la seminario.

Kvankam estis iom da tradukado por neesperantistaj prelegantoj, Agneta Derrien, estrino de Eŭropa Junulara Fondaĵo — ĝi subvenciis la seminarion — kaj Mirosław Turalski, reprezentanto de la pola sekcio de Internacia Junulara kaj Studenta Movado por Unuiĝintaj Nacioj, spertis, ke Esperanto estas la ĉiutaga lingvo de la seminario.

La partoprenantoj de la seminario produktis du rezoluciojn. Unu direktiĝis al s-ino S. Veil, la prezidanto de Eŭropa Parlamento, kaj petis starigon de la komisiono pri lingvaj problemoj en Eŭropa Komunumo, kiel proponis al la Parlamento en 1979 la parlamentano Coppieters. (Intertempe s-ino Veil respondis, ke oni ankoraŭ studas tiun proponon.) La alia rezolucio iris al LKK de la Universala Kongreso en Antverpeno kaj al la Estraro de UEA, sugestante ke oni informu kaj enplektu membrojn kaj funkciulojn de Eŭropaj Parlamento kaj Komisiono en la Kongreson.

Paŭlo S. Hopkins



GEJUNULOJ en la Korea Esperanto-movado estas la plimulto. Jen parto de ili en granda rondo, en nokta kunsido, dum la 13a Korea Esperanto-Kongreso, pri kiu ni raportas sur la paĝo 204. Fakte, tiu svarmo de gejunuloj, kiuj en tiu azia lando interesiĝas pri Esperanto, devus esti la ĉefa, la esenca novaĵo atentinda. Dekstre estas kantema grupo el Ĉungnam. Ĝi pravas, ke la korea Esperanto-junularo ne estas malpli gaja kaj kantema ol la junaj homoj en aliaj mondpartoj.

Svedio

• Sveda Esperanto-Federacio viglas en sia nova sidejo centre de Stokholmo. Ne mankas novaj ideoj al SEF, kion oni bone konstatas ankaŭ el ĝia alloga revuo *La espero*. Ŝajnas, ke svedoj sukcesas animi ankaŭ kelkajn malnovajn ideojn. Unu el ili estas la kreo de libro-klubo. Ĝi nomiĝas

**NOVA
LIBRO**

"Nova libro"
kaj ĝi jam arigas plurdekondamembroj.

Ĉiumonate la klubanoj ricevas iun el la plej novaj eldonaĵoj en Esperanto. Ĝis nun la klubanoj ricevis *Nova amiko inter ni* de S. Chaves, *Ĉu li venis trakosme?* de Valano kaj *Mondo de travivaĵoj* de T. Sekelj.

Usono

• En la septembra-oktobra numero de la revuo *The Mother Earth News* (La novaĵoj de Panjo Tero) aperis artikolo pri Esperanto de Joseph Conroy (delegito en Filadelfio). Rezulte de tiu artikolo, Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, la usona landa asocio, ricevis nur ĝis la 22a de oktobro pli ol ducent informpetojn. En Usono tio estas rekorda nombro, ĉar ELNA kutime ricevas 400 ĝis 600 informpetojn jare.

• **Soveta Unio:** En Kaunas (Litovio) troviĝas ĉi tiu domo, kies posedanto estis la familio de Klara Zilbernik, edzino de d-ro L.L. Zamenhof. Li ĉi tie konatiĝis kun sia estonta edzino, ofte gastis kaj dum iu periodo eĉ loĝis. Pro tio la strato en kiu la domo troviĝas (fotita antaŭ la rekonstruo) portas la nomon de Zamenhof.



Soveta Unio

• Instru-metodika Komisiono de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj organizis antaŭ nelonge 3-tagan seminarion pri la Esperanto-instruado. Al la seminario, kiu okazis en Ufa, venis 40 partoprenantoj el 16 diversaj urboj. La kostojn de la seminario, inkluzive de la vojaĝo, kovris ekstermovada junulara organizaĵo. Pri la seminario raportis la lokaj televido, radio kaj gazetaro.

Kolombio

• Pluraj esperantistoj membras en la grupo de amatoraj astronomoj en Medellín. La grupo estas kontakte-

bla pere de la ĉefdelegito de UEA: s-ro L.G. Restrepo R., Apartado Aérea 4262, Medellín, Kolombio.

• Dum sia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, meze de ĉi tiu jaro, Peter Schilperoord el Britio prelegis dufoje en Medellín pri "Kiel Nederlando reakiris teron el la maro". Ambaŭ prelegoj okazis en Esperanto, kun interpreto en la hispanan, por du fakaj institucioj.

Fake

Informado

• En *Cvičenia zo slovenského jazyka* (Ekzercaro de la slovaka lingvo), lernolibro por la 5a klaso de la elementaj lernejoj, aperinta en Bratislava (Ĉeĥoslovakio), unu el la aŭtoroj, prof. Eduard Gašinec, mencias Esperanton en du ĉapitroj. Tie troviĝas bazaj sciindaĵoj pri la lingvo. Tio certe estas tre trafa maniero informi la junularon pri la Internacia Lingvo.

Bibliografio

• La anglalingva *Internacia bibliografio de libroj kaj artikoloj pri la modernaj lingvoj kaj literaturoj* estas eldonata ĉiujare de la Asocio pri Modernaj Lingvoj, en Nov-Jorko. Jam en la volumo de 1979 estis ampleksa sekcio pri "internaciaj lingvoj". La volumo por la jaro



• **FR Germanio:** Fruan Zamenhof-feston celebris, la 18an de novembro, la esperantistoj de Paderborn. Parolas prof. István Szerdahelyi el Budapeŝto; maldekstre de li vidiĝas alia vizitanto, kantisto Veselin Damjanov el Sofio.

1980 ĵus aperis. Ĝi enhavas 237 erojn pri Esperanto aŭ projektoj de internaciaj lingvoj. Kompilintoj de tiu sekcio estis Humphrey Tonkin kaj W.A. Verloren van Themaat.

Tradukoj

- *Zeg, luister eens* (Nu, aŭskultu) estas la titolo de la ĵus aperinta antologio de eksterlanda poezio en nederlandlingva traduko. Aperis en ĝi ankaŭ Esperantaj poemoj de Kalocsay, Auld, Ragnarsson kaj De Kock, en la traduko de d-ro W.A. Verloren van Themaat. Esperanto estas tre bone reprezentita en tiu poezia volumo, kiu krome enhavas 5 tradukojn el la franca, 4 el la germana kaj po unu el la lingvoj: angla, finna, hungara, rusa kaj serbokroata.
- La verko de s-ino Jo van Hemert-Remmers, *Sur insulo malproksima*, kies Esperanta originalo aperis en 1957 ĉe Dansk Esperanto-Forlag, nun eldoniĝis en la japanlingva traduko de Joŝihiko Haŝiguĉi. La verko priskribas la japanan okupacion de Indonezio dum la dua mondmilito. Eldonis: Asahi Kultura Centro, Osako 1981. Antaŭ du jaroj en Japanio aperis ankaŭ la traduko de la fama romano *Kredumino, sinjorino!* de Cezaro Rossetti.

Malarmado

- Esperanto estas favore menciita en la nova (anglalingva) informfolio de la Kampanjo pri Monda Malarmado. Inter la rekomenditaj agadoj por paca kaj justa mondo estas subteno al Esperanto, kun adreso por informpetoj. La Kampanjon starigis la britaj parlamentanoj Fenner Brockway kaj Philip Noel-Baker, membroj de la Brita Esperanta

GRAFIKA CENTRO DE UEA HAVAS NOVAN ADRESON

Grafika Centro de UEA en Antverpeno estos fermita inter la 21a de decembro 1981 kaj la 3a de januaro 1982. En tiu periodo ĝi definitive instaligos en la nova domo de Institucio Hodler. La nova adreso estas: Grafika Centro de UEA, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. La nova telefonnumero de la Centro estas: (031) 34 34 00. La sama adreso estonte validos ankaŭ por Flandra Esperanto-Ligo kaj Flandra Esperantista Junulara Asocio.

Parlamentara Grupo. La Kampanjo organizas petskribon, pri kiu aperis anonco en la aprila numero de nia revuo.

Turismo

- *Frankfurt am Main ĉe pulso de l' mondo*, tiel nomiĝas la bela kolora prospekto, ĵus eldonita en Esperanto fare de la turisma oficejo de tiu germana grandurbo. Strange kaj nekutime estas, ke tiu oficejo ne pretas financi la distribuon de la prospekto kaj petas, ke oni aldonu internacian respondkuponon petante la eldonadon ĉe: s-ro Walter Ullmann, Danziger Str. 28e, D-6360 Frieberg (H), FR Germanio.

Sindikatoj

- En la lasta tago de oktobro atingis nin la unua numero de *Informilo de Soci-Esplora Centro por la Regiono de Meza Odoro de Sendependa Aŭtonomia Sindikato "Solidareco"*. Tiu 6-paĝa mimeografita sed belaspekta bulteno en Esperanto enhavas iom da bazaj informoj pri la nova sindikata movado en Pollando. La

KOREKTO PRI LA REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ

La prezidanto kaj sekretario de Belartaj Konkursoj de UEA bedaŭras, ke en la rezultoj por 1981 (vidu la septembran numeron de nia revuo, paĝo 154) enŝteliĝis eraro pri la titolo de la verko, kiu gajnis la duan premion en la branĉo "Prozo". Bernard Golden (Hungario) gajnis la premion pro sia prozaĵo *Vigla nokto en la haremo*, kaj ne pro *Ampruvo*, verkita de alia konkursinto.

unua numero aperigis ankaŭ pure Esperantajn kontribuojn: "La Espero" (himno), foto de Zamenhof, teksto pri la Centjara Jubileo de Esperanto ktp. La *Informilo* estas mendebla ĉe: Regionalny Ośrodek Badań Społecznych Środkowego Nadodrza NSZZ "Solidarność", al. Nipodległości 32, PL-65-042 Zielona Góra, Pollando. Ŝajnas, ke sufiĉas sendi unu internacian respondkuponon por kovri la afrankon.

Personoj

Bormann

- S-ino Elsbeth Bormann, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, ricevis altan ŝtatan distingon pro sia multjara laboro (i.a. en la Esperantomovado) lige al la egalrajteco de la virinoj en la socio. La "Meritkrucokun Rubando", per kiu s-inon Bormann honoris la Prezidento de Federacia Respubliko Germanio, estis transdonita al ŝi en festa ceremonio, la 25an de novembro, fare de prof. d-ro Tarnowski, senatano de Hamburgo.

Shinoda

- D-ro Hideo Shinoda, honora membro de UEA kaj honora prezidanto de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio), ekiris en julio al la Kongreso en Brazilo, sed malsaniĝis survoje kaj restis en Lima (Peruo). Kiel li mem skribis al ni fine de oktobro, temis pri "altmontara malsano", de kiu d-ro Shinoda eksuferis kiam la karavano en kiu li troviĝis atingis 3 486 metrojn super la marnivelo. La malnova Esperanta aktivulo jam bone fartas kaj reprenis

siajn direktorajn taskojn en japana hospitala grupo. Li jam aliĝis al la 67a UK kaj promesas, ke tie ne mankos la tradicia UMEA-bankedo, per kiu li jam de pluraj jaroj honoras la gajnantojn de la UMEA-premio por la plej bonaj fakaj artikoloj pri medicino en Esperanto.

Snarberg

- La juvelisto Jack Snarberg, fakdelegito en Jönköping (Svedio), estas unu el tiuj esperantistoj, kiuj insistas pri utiligo de la Internacia Lingvo ankaŭ por siaj profesiaj okupoj. Meze de oktobro li forveturis por plia dumonata vojaĝo tra Azio. Li importas juvelojn el tiu mondparto kaj intencas insiste utiligi Esperanton por siaj kontaktoj en Hinda Unio, Tajlando, Nepalo, Hongkongo kaj eble eĉ Birmo, kie laŭ nia scio ne ekzistas esperantistoj ĝis nun. UEA disponigis iom da informmaterialo por utiligo dum la vojaĝo. Estas interese, ke s-ron Snarberg akompanas sveda ĵurnalistino, kiu intencas raporti en sveda gazetaro pri la vojaĝspertoj.

INDEKSO

Revuo *Esperanto*, 74a jarkolekto, numeroj 901-912

Abaĝieva, N.C. 154
Administrado 1, 4, 62, 83, 163
Afriko 48
Akademio 167
Alikoski, H. 151
Anuruddha, T.T. 18
Ardestrup, T. 177
Argentino 15, 137
Arto 154, 156
Ast, S. 45
Astronomio 214
Atanasov, A.D. 63
Auld, W. 25, 46, 108, 111, 133, 145
Austin, M. 177
Aŭtomatigo 163
Aŭstralio 75
Aŭstrio 15, 176
Bagger, P.V. 16
Baghy, J. 188
Bajron 133
Bakin 54, 138, 149
Bakker, H. 48, 213
Barrocas, A. 151
Bánky, R. 129
Belartaj Konkursoj 154, 167, 174
Belgio 36, 56, 136
Benczik, V. 37, 53, 131
Bengtsson, I. 138, 183
Bergner, S. 202
Bertin, C. 211
Berveling, G. 32
Bibliografio 13, 34, 37, 54, 73, 112, 134, 172, 176, 212, 214
Bibliotekoj 36, 187
Birch Olsen, S. 77
Blanke, D. 9, 130, 170
Blinduloj 37
Bonafous, M. 78
Borges dos Santos, M. 154
Bormann, E. 215
Bormann, W. 151
Boulton, M. 16, 27, 32, 188
Brazilo 8, 15, 21, 56, 106, 115, 141, 175, 182
Brennan, A. 49, 181
Britio 45, 136, 177, 182, 193
Brockway, F. 215
Bruin-Kooij, I. de 211
Bujdosó, D. 78
Bulgario 137, 176
Campbell, N.J. 18
Canty, Y.M. 177
Cappa, G. 111

Centjara Jubileo 161
Chaler Arnau, S. 78
Chapman, H. 72
Chaves, A. 143
Chaves, S. 8, 110, 186
Childs-Mee, A. 194, 198
Conroy, J. 214
Cool, J. 133
Corsetti, R. 128
Cuadra, A. 202
Ĉeĥoslovakio 36, 135, 137, 214
Ĉen Juan 151
Ĉilio 97
Ĉinio 15, 24, 66, 76, 126, 166, 178, 182
Damjanov, V. 77, 214
Dante 132
Dawson, A. 213
Daŝgupto, P. 133, 192
Dávila, S. 202
Dawson, A. 213
Diez Mateo, F. 177
Diplomatoj 142, 153, 183
Dobre, M. 47
Dratwer, A. 78
Dratwer, I. 33
Drees, W. 138
Dresen, H. 12, 25
Duc Goninaz, M. 121, 170, 213
Eder, J. 220
Eijndthoven, W.G. van 178
Ekologio 98
Eksteraj rilatoj 35, 61, 88, 113
Ekzameno E 19, 39, 60, 78, 116, 118, 139
Eldona agado 5
Eldonaĵoj
 Al abelujo ĝi flugas 12
 Apliko de E. en scienco... 108
 Aŭtuno en la printempo 54
 Aŭdu kaj lernu 110
 Baza literatura krestomatio 53
 Biblioteka manlibro 32
 Cetacoj, La 133
 Ĉu li venis trakosme? 132
 Datentransiga proceduro X.25...,
 La 211
 Don Johano 133

E-vortaro per temo-tabeloj 171
El unu verda vivo 111
Energio 211
Esperanto 86
Fatomaŝino, La 172
Gvidlibro por supera ekzameno
 53
Ĝavanan 209
Hieroglifo 54
Iam kompletigota plena verkaro
 de L.L. Zamenhof 201
Infero 132
Internacia lingvo – sciencaj
 aspektoj, La 170
Janusz Korczak 53
Joĉjo, la amiketo 32
Karnavaletto 210
Kiel personeco sin strukturas 111
Kredu min, sinjorino! 215
Konsultlibro pri E-bibliotekoj...
 32
Lidja Zamenhof; Vivo kaj agado
 33
Lingvaj ludoj de GEJ 72
Mi amas... 109
Naŭ jaroj en la Infero 108
Nova amiko inter ni 110
Nuancoj; Poemoj 12
Omnibuso kun la tri pasaĝeroj,
 L' 71
Pendumilaj lidoj 133
Per nia nura vol' 33
Plena analiza gramatiko 3
Prilingvaj artikoloj de Ossaka 72
Probablokalkulo 71
Robaĵoj, La 108
Socipolitikaj aspektoj de la E-
 movado 170
Somermeze 210
Sur insulo malproksima 215
Sur la vivopado 210
Transoceana 103
Tri noveloj 12
Tutmonda sonoro 131
Vivo estas tute alia, La 32
Elezcano y M., M. de 18
Emmelkamp, I. 113
Enghardt, J. 58

Bindilo por teni ordon

NI POVAS POR VI INDEKSI LA JARKOLEKTON, SED LA INDEKSO TAMEN NE DIROS AL VI KIE TROVIĜAS LA BEZONATA NUMERO DE LA REVUO. ION ONI DEVAS FARI TIURILATE! NE EBLAS SIMPLE TIEL LASI UNUOPAJN NUMEROJN, KE ILI TRENIĜU TRA BRETOJ, TIRKESTOJ, ĈAMBROJ KAJ JAROJ. JEN LA SOLVO:

Bela bindilo el malhelruĝa kvazaŭleda plasto por teni en bona ordo la 11 ĉi-jarajn numerojn de nia revuo kostas 9,00 (por Nederlando 10,62) guldenojn, plus sendokostoj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nw Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Enketoj 23
 Eroŝenko, V. 127
 Esperantologio 16, 125, 152, 183
 Estrara Raporto 1980 83, 153, 169
 Eŭropa Junulara Fondaĵo 213
 Evolulandoj 15, 48
 Faka agado 50, 81, 93, 104, 115, 126, 168
 Faka literaturo 6, 37, 66
 Filatelo 31, 115, 173
 Filipinoj 137
 Financo 85, 94-96
 Finnlando 154
 Flandra Esperanto-Ligo 215
 Forge, J. (Fethke, J.) 7
 Francio 36, 75, 113, 154, 182
 Frank, H. 151
 Friis, L. 149
 Gabrielli, L. 12
 Gamberini-Billi, G. 19
 García López, R. 78
 Gastlaboristoj 130
 Gaŝinec, E. 214
 Gauder, A. 220
 Gazetaro 184
 Germana DR 9, 130
 Germanio, FR 114, 136, 137, 214, 215
 Gething, W.A. 219
 Geus, S. de 18
 Gibczyńska, J. 206
 Gjivoje, M. 32
 Golden, B. 19, 39, 60, 78, 113, 116, 139, 154, 168, 207
 Goo 76
 Gooch, C. 78
 Grafika Centro Antverpeno 84, 101, 215
 Gregurek, T. 178
 Gusev, K.M. 58
 Gvatemalo 56
 Ĝenerala Regularo de UEA 162
 Haase, M. 14, 175
 Haddon, R. 158
 Hall, A. 33
 Han Moo-hyup 204
 Handikapuloj 43, 67, 115, 197
 Handikapuloj, Internacia Jaro de 41, 152
 Hanson, N. 219
 Harry, R. 189
 Haszpra, O. 151
 Haŝiguĉi, J. 215
 Hemert-Remmers, J. van 215
 Heugten, W.A.M., van 12, 32, 53
 Hinda Unio 36, 56, 137, 192
 Hispanio 15, 97, 135, 182
 Homaj rajtoj 137
 Hopkins, P.S. 213
 Houghton, C.M. 219
 Huĝimoto, T. 201
 Hungario 81
 Ĥejr-Ĥah, R. 209
 Infankongreseto 11
 Infanoj 10, 167

Antaŭdankon por la frua pago de via kotizo por la jaro 1982

Informadiko 57, 77
 Informado 1, 16, 24, 36, 57, 87, 115, 125, 136, 137, 176, 183, 186, 214
 Instituto Hodler 85, 101
 Instruado 10, 28, 182, 194
 Instruistoj 37
 Interlingvistiko 9, 176
 Internacia Kongresa Universitato 151
 Interpretado 57
 Irano 6, 97, 209
 Islando 114
 Isobe, Y. 115
 Israelo 114, 193
 Italio 75, 113, 114, 176
 Ito, K. 201
 Janton, P. 176
 Japanio 76, 97, 102, 136, 191, 215
 Jarc, I. 19
 Jevsejeva, L. 58
 Jones, R.K. 23
 Jud, P.A. 78
 Jugoslavio 6, 37, 129, 136, 182
 Jung, T. 57
 Kalendaro 50
 Kalocsay, K. 27, 131, 132
 Kasteiviva, S. 33
 Kat, J.O. de 71, 211
 Kawasaki, N. 72, 177
 Kemalov, N. 108
 Kemio 115
 Kenjo 114
 Kimono 190
 Kindler, H. 98
 Kolker, B. 12, 54, 211
 Kolombio 114, 214
 Komencantoj 181
 Komerco 215
 Kongresoj:
 UK 65a, Stokholmo 86
 UK 66a, Brazilio 21, 30, 70, 141-160, 163
 UK 67a, Antverpeno 165, 173
 IJK 37a, Oastepeko 35, 158
 IJK 38a, Lovenio 174
 Kongresoj aliaj:
 Fervoĵista 76, 104
 Infana 11
 Koreo 36, 136, 204, 213

Kořínek, J. 177
 Kotizoj 179
 Krčmar, S. 12
 Krikke, W. 33, 54
 Kristjánsson, Ó. Th. 219
 Krizantemo (pseŭd.) 190
 Kubo 97, 114
 Kuhl, E. 72
 Kull, E. 178
 Kulturo 21, 64, 90, 102, 145, 205
 Kuusberg, P. 210
 Kuwahara, T. 151
 Labortendaroj 14, 74, 175
 Landa agado 6, 47, 92, 130
 Leijder, H.A. 78, 178
 Lekko, A. 210
 Lernejoj 193
 Lernolibroj 8, 37, 56, 137
 Leslie, J.W. 178
 Libroj 68, 97, 131
 Liiv, J. 12
 Lingva diskriminacio 76, 149
 Lingvistiko 16
 Lingvo 28, 46, 207
 Lingvo-politiko 213
 Lingvo-problemo 23, 45
 Lins Albuquerque, J. 144
 Lins, U. 201
 Literaturo 25, 57, 122, 155
 Llech-Walter, R. 37
 Lloancy, R. 111
 Lo Jacomo, F. 50, 125, 151, 213
 Logvin, A. 58
 Lusin 126
 Mabesoone, J.M. 151
 MacGill, S. 14, 74, 125, 154, 186
 M'Bow, A.-M. 42, 61
 Maertens, G. 1, 142, 148
 Malarmado 215
 Malto 6, 182
 Manteca López, M. 220
 Manuskriptoj 177
 Mariano, M. 171
 Marmin, J.-P. 213
 Martinus 178
 März, H. 32
 Masterman, D.L. 154, 210
 Matematikistoj 50, 177
 Matland, N.J. 78
 Matuda, S. 178

Maul, S. 77
 Mayor, F. 41
 Medicino 137
 Mediŝauskas-Medonis, E. 18
 Meksikio 17, 158, 176
 Membro-statistiko 59, 84
 Mensa Internacia 198
 Merrick, F. 78
 Mikk, A. 19
 Milojević, S. 4, 7, 43, 141
 Minet, G. 213
 Mitterrand, F. 116
 Miyamoto, M. 71
 Mongolio 66
 Mosonyi, E. 137
 Movado 1, 43, 103, 165
 Muziko 156, 177
 Nederlando 36, 97, 137, 196
 Neergaard, P. 138
 Nervi, M. 12, 132, 154, 155, 172
 Nikaragvo 202
 Nikolov, Z. 37
 Noel-Baker, P. 215
 Nogueira, R.P. 106
 Norvegio 36, 114, 176, 206
 Nourmont-Moon, C. 17, 36
 Nov-Zelando 15
 Oficiala informilo 17, 38, 58, 77,
 116, 138, 178, 219
 Öfors, A. 11
 Otto, E. 32
 Padua, G. de 219
 Parlamenta agado 45, 215
 Pavletić, M. 78
 Pechan, A. 53
 Peeters, Y. 213
 Pettyn, A. 28
 Pharo, E. 178
 Pikarda Somera Popoluniversitato
 213
 Pilger, W.F. 67, 110, 133, 196
 Pinto, A. 18
 Pióro, J. 54

Piron, C. 15, 16, 77, 111
 Podkaminer, S. 16, 149
 Pollando 154, 215
 Poppeck, F.W. 32
 Poŝtmark-kolektado 85
 Potts, B. 195
 Power, C.R.L. 53, 184
 Proctor, M. 18
 Pupteatro 129
 Radio 8, 37, 39, 56, 119, 183, 200
 Ragnarsson, B. 21, 57, 64, 102, 205
 Regal, J. 202
 Régulo Pérez, J. 57
 Reiersøl, O. 71
 Rentmeister, W.F. 19
 Rezolucioj 149, 152, 161
 Ritterspach, G. 105
 Roover, R. de 154
 Rossetti, C. 215
 Rossi, N. 210
 Rotarianoj 16
 Rousseau, J.-A. 137
 Rumanio 47
 Sabljčić, B. 78
 Sadler, V. 77, 101, 160, 163
 Saheb-Zamani, M.H. 6
 Saito, E. 71
 Salan, G. 58
 Sánchez, L. 202
 Saunders, H.P. 19
 Schaapsveld, T. 153, 183
 Schilperoord, P. 115, 214
 Schubert, K. 71, 210
 Schwarzer, E. 35
 Scienca Eldona Centro de UEA 81,
 126
 Sciencfikcio 57
 Scienco 16, 23, 137, 183, 196
 Sekelj, T. 17, 151, 183
 Semajno de Internacia Amikeco 56
 Seminarioj 213
 Sennacieca Asocio Tutmonda 169
 Seppik, H. 28
 Setälä, V. 123
 Sherwood, B.A. 6, 177
 Shinoda, H. 215
 Siekierski, L. 178
 Signore, E. 220
 Silbern timer, K. 214
 Simonnet, F. 153
 Sindikatoj 215
 Skotte, J. de 18
 Slanina, A. 18
 Smet, W.M.A. de 133
 Snarberg, J. 215
 So Gilsu 151
 Solidareco 215
 Someraj Universitataj Kursoj 97
 Soveta Unio 37, 56, 125, 214
 Sredić, G. 130
 Starke, A. 97
 Steele, T. 66, 103, 108
 Štimec, S. 6, 129, 154
 Stitz, J.P. 19
 Støp-Bowitz, C. 149

Su, A. 183
 Sumber, I. (pseŭd.) 110
 Supersignoj 207
 Sutton, G. 137
 Svedio 56, 114, 136, 138, 206, 214
 Svislando 16, 130
 Symoens, E. 194
 Szabó, A. 220
 Szabó-Felső, F. 2, 57, 66
 Szalay, S. 220
 Szczurek, K. 12
 Szerdahelyi, I. 214
 Ŝakistoj 76
 Ŝulco, R. 109, 133, 210, 214
 Tajlando 56
 Teatro 97, 113, 115
 TEJO 14, 35, 55, 74, 90, 113, 135,
 159, 175, 213
 Telefono 196
 Televido 16, 17, 204
 Tell, L. 18
 Terminaroj 168
 Tišljär, Z. 167
 Tófalvi, É. 154
 Tonkin, H. 16, 152, 165, 215
 Tóth, E. 178
 Tradukoj 76, 215
 Trofeo Fyne 36, 82
 Turismo 2, 76, 215
 Tytgat, K. 213
 Tyynelä, T. 154
 Tzaut, O. 210
 UEA:
 Estraro, 4, 62, 150, 161
 Komitato 149
 Ueyama, M. 71, 109
 Ullman, P.L. 154
 UN 15, 41, 75, 88, 114, 189
 Unesko 16, 61, 89, 146
 Universitatoj 56, 98, 125
 Usono 15, 23, 75, 137, 177, 214
 Vahen-Svetinov, D. 178
 Valano, J. (pseŭd.) 132
 Veil, S. 213
 Velebit, J. 12
 Venezuelo 57, 136, 137
 Verloren v. Themaat, W.A. 72, 215
 Vetter, R. 108
 Viera da Silva, P. 151
 Virina agado 49
 Vjetnamio 182
 Volontula Servo 84, 137
 Vortaroj 15, 76
 Walters, E.D. 178
 Wandel, A. 159
 Waringhien, G. 26, 121, 171
 Wells, J.C. 45
 Wenclewski, A. 133, 151
 Wetzel, D. 183
 Wit, A.J.F. de 211
 Wood, R.E. 183
 Yamakawa, S. 191
 Zairio 48
 Zamenhof, L.L. 177, 201, 207, 214
 Zilbernik, K. 214

Brazilaj filatelaĵoj

*La bela brazila poŝtmarko, eldonita
 omaĝe al la 66a Universala Kongreso,
 estas havebla ĉe la Libroservo de UEA:*

- A. Unuataga koverto plus Edital-
folio 5,40 gld.
- B. Kiel A, plus bloko de 4 neuzitaj
poŝtmarkoj 7,50 gld.
- C. Kiel B, plus paro aŭ kvaropo de
uzitaj poŝtmarkoj 9,00 gld.

*Se vi mendas nur la filatelaĵojn, pensu pri
 la minimumaj sendokostoj de 5,00 gld.
 Nederlandanoj bv. aldoni 4 procentojn da
 imposto. Je mendo de almenaŭ tri sam-
 specaj kompletoj vi ĝuas trionan rabaton.*

N-ro 548

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: M.H. McClelland. Finnlando: Anja Launiainen. FR Germanio: D. Meier. Italio: F. Knoflach.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

FR GERM: 201 Margarete Schumacher; 202 Felix Epstein. HISP: 203 Fernando Prieto de León. KAN: 204 Wilfred Settle.

DONACOJ 1981 (Gld.)

ĝis la 31a de oktobro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: FR Germanio: M. Westenmayer 10,00. Svedio: Erik Svård 23,08. Loterio Stokholmo 173,81. Sumo ĉi-jara 5 427,73.

FONDAĴO CANUTO: Brazilo: Maria Almada 75,00. Finnlando: I. Helsingius 135,60. FR Germanio: E. Woller 77,13. Sumo ĉi-jara 4 139,03. ĜENERALA KASO: Brazilo: I.A. de Albuquerque Doretto 175,00. FR Germanio: M. Gründler 55,09; K. Simon 11,02. Hispanio: F. Prieto León 13,45. Kamerunio: J.-M. Mboge Mbele 10,00. Svislando: N. Gessaga 13,12. Diversaj malgrandaj 34,98. Sumo ĉi-jara 11 424,07. PROPAGANDA KONTO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Sumo ĉi-jara 250,00.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Belgio: L. Drèze 67,60. Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 200,00. Sumo ĉi-jara 3 022,04. NOV-JORKA OFICEJO: Klubo 777 (po \$777): Aŭstralio: E-Federacio de New South Wales (2820,00 gld). Usono: Julie Dinnel; Dorothy Holland. Patronoj (minimуме \$100): Aŭstralio: E-Societo Brisbane (307,00 gld); Ilija Grahovac (\$105); B.C. Williams. Finnlando: Oskari Lehtivaara. Japanio: Masahisa Niwa; Oomoto; Isamu Yamaga; Saburo Yamazoe. Kanado: P. Larose. Usono: Alberta Casey; Lucille Harmon; Elizabeth Manson; Julius Manson; Ken Thomson. Sub-

tenantoj (minimume \$25): Aŭstralio: Aŭstralia E-Asocio (153,50 gld); S.J. Campbell; I. Hetheral; E-Klubo Oakleigh; R. Weis. Finnlando: Arvo Korpela. Japanio: Takasi Oohara. Kanado: Myra Larson (\$50). Usono: Cleo J. Fort; Pierre Ullman (159,20 gld). Amikoj (minimume \$10): Aŭstralio: V. Clark; Emil Hanhinie-mi; E-Klubo de Kaprikorna Marbor-do (61,40 gld); J.B. Moore; R.S.P. Reed; E.C. Thomas; E-Societo Toowoomba; W. kaj M. Wybenga. Finnlando: Martti Pennanen (61,90 gld). Kanado: M. Jones. Sud-Afriko: Axel Von Blottnitz (\$17). Usono: J. McAloon (\$20). Ceteraj donacoj: Aŭstralio: Ralph Harry (pliaj \$50). Usono: Lura R. Chapman (pliaj \$10). Aŭkcio en Brazilo (kompleti-go, 256,33 gld). Sumo ĉi-jara: 32 493,91 gld.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologoj

GERALDO PÁDUA (1913-1981), antaŭa prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, mortis la 3an de aprilo. El liaj multaj postlasitaj tradukaĵoj, *La morto de Kinkas Akvobleko* de Jorge Amado kaj *Inocência* de vic-grafo Taunay estas nun preparataj por eldono. Manuskripte ekzistas ankaŭ lia ampleksa pereksempla portugala-Esperanta vortaro.

ÓLAFUR TH. KRISTJÁNSSON (1903-1981), kiu servis kiel vicprezidanto de LKK de la 62a UK (Rejkjaviko, 1977), mortis la 3an de aŭgusto. Li lernis la lingvon en 1921 kaj aperigis gravan artikolserion pri ĝi en la ĵurnalo *Athýdubladid* en 1925. En 1930 aperis lia verko *Islando – lando, vivo, literaturo*, kaj en 1939 lia Esperanta-islanda vortaro. Li estis kunredaktoro de la beletra revuo *Voĉo de Islando* (1949-50, 1959-60), kie aperis kelkaj liaj tradukoj.

C.M. HOUGHTON (1894-1981), konata erudiciulo pri gramatiko kaj movada historio, honorofica sekretario de Brita Esperanto-Asocio de 1962 ĝis 1965, dumviva membro de UEA, forpasis en Arkholme (apud Morecambe), Britio.

WILLIAM ALFRED GETHING (1896-1981), unu el la ĉefaj aktivuloj de la brita Esperanto-movado, prezidanto de BEA de 1949 ĝis 1955 kaj de Londona Esperanto-Klubo de 1956 ĝis 1957, mortis la 26an de julio. Li tradukis la tre ŝatatan *Bildlibro pri bestoj* (1961).

NELLIE HANSON (1901-1981), pli ol dudek jarojn fakdelegito, mortis la 5an de septembro. Ŝi instruis Esperanton kaj persone kaj kore-

1887 kaj la sekvo...

Eseoj IV

Tio estas la titolo de la sola volumo de la eseoj de Gaston Waringhien nun aĉetebla (33,00 gld). Se vi eĉ per oro pretus hodiaŭ pagi ekzempleron de la unuaj tri volumoj – "Eseoj I", "Lingvo kaj vivo", "Ni kaj ĝi" – malfacilas kredi, ke vi sukcesus akiri ekzempleron. Tiel ĉiam okazas kun gravaj verkoj de gravaj aŭtoroj. Ne atendu la elĉerpigon de "Eseoj IV" por poste vane klopodi akiri ĝin. Mendu jam nun ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe la Eldonejo TK/STAFETO. Cetere, la sama eldonejo havas por vi ankaŭ plurajn aliajn gravajn kaj interesajn librojn. Ekzemple: "Esperantologiaj studoj" de Wüster (24,00 gld), "Je la flanko de la profeto" de Chiussi (33,00 gld). "Ĉu li bremsis sufiĉe, 3a represo, de Valano (14,70 gld), "Ĉu li venis tra-kosme" de Valano (24,60 gld), "Fabeloj de la verda pigo" de Beaucaire (19,80 gld) ktp. Mendu antaŭ ol estos malfrue! TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio – aŭ, kiu ajn Esperanta libroservo.

sponde, kaj servis kiel ekzamenisto pri Esperanto por la brita Reĝa Societo de Artoj. Ŝi helpis la Movadon ankaŭ mecenate.

MIGUEL MANTECA LÓPEZ (1913-1981), kiu dum kelkaj jaroj estis fakdelegito pri turismo por Alicante (Hispanio), mortis la 21an de septembro. Lia financa subteno ebligis la eldonon de *La ingenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* de Cervantes, en traduko de Fernando de Diego, en 1977.

ANDREO GAUDER (1908-1981), delegito kaj fakdelegito pri lingvo-instruado en Győr (Hungario), mortis lastatempe.

ANDREO SZABÓ (1922-1981), plurfoja premiito de Belartaj Konkursoj (proza branĉo), tradukinto

de la gulivera romaneto *Kapilario* (aperinta ĉi-jare samvolume kun *Vojaĝo al Faremido*) de Frigyes Karinthy, mortis la 22an de januaro. Eble lia plej konata novelo, aperinta en la BK-antologio *25 jaroj*, estis "Morto de la poeto" (1968), kiun inspiris la entombigo de Julio Baghy.

ENZO SIGNORE, kiu dum trideko da jaroj aktivis en la loka Esperantomovado, mortis antaŭ nelonge en Triesto (Italio).

SÁNDOR SZALAY (1895-1981), eldonisto de pluraj E-libroj (i.a. de Baghy), iama ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Societo, mortis antaŭ nelonge en Budapeŝto.

JOSEF EDER, dumviva membro de UEA, forpasis lastatempe en Gremühle (FR Germanio).

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

20-jarulino korespondus pri muziko kaj utopia literaturo: Heidi Schuster, Hauptstrasse 104, DDR-8238 Schellerhau, Germana DR.

Pola inĝeniero, komencanto, deziras korespondi pri turismo kaj filatelo: Ryszard Niewiadomski, Ul. Jana Matejki 24m6, PL-50-333 Wrocław, Pollando.

50-jara komencanto serĉas korespondantojn: s-ro Huynh-Quoc-Dan, 1 Vo-Truong-Toan, Quan 5, TP/Ho-Chi-Minh, Vjetnamio.

Usonajn korespondantojn serĉas 18-jara lernanto: Hossein Mohammadi, Hakimnezami Highschool, Ghom, Irano.

Bulgara filologo volas korespondi pri literaturo: s-ino Stefka Ivanova Pojarkova, Ul. Ĥristo Botev 28, vh. B, et. 4, ap. 12, Stara Zagora, Bulgario.

14-jara knabo deziras korespondi pri geografio, historio, sporto: Andreo Michalski, ul. Raszewska 7/8, PL-63-400 Otrów Wlkp, Pollando.

Izolita komencanto petas korespondajn kontaktojn: s-ro M. Kardamudini, P.O. Box 203, Sirjan, Irano.

Inĝeniero serĉas korespondantojn: s-ro Zygmunt Wons, Sosnowskiego 6, m.30, PL-02-784 Warszawa, Pollando.

Pro diversaj kaŭzoj, mi ne vojaĝos ĉi tiun vintron al Egiptio. Informpetantoj bonvolu ne skribi al mia adreso en Kairo, sed al mia adreso en D-8381 Rossbach, FR Germanio. **D-ro Tadros Megalli**, D kaj FD en Kairo kaj Rossbach.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Pasporta Servo de TEJO. Gastigantoj bezonataj por 1982. Skribu al: J.M. Cash, 5, allées des Félibres, F-31520 Ramonville-St. Agne, Francujo.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondukuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem.

Kimro en Saŭdi-Arabio, komputilisto, volas korespondi por perfektigi sian lingvoscion: s-ro W.S. Jenkins, B.A.C. Ltd., P.O. Box 1732, Riyadh, Saŭdi-Arabio.

Esperanto-Eldonejo Palatina kklr ŝanĝis respondeculon kaj adreson. Oni skribu al: s-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, Iggelbach, D-6738 Elmstein, FR Germanio. Pro kelkmonata malsano kaj operacio s-ro Hegen bedaŭrinde ne povis ĝis nun respondi al leteroj kaj mendoj.

Aviadisto, 32-jara, volas korespondi por perfektigi sian lingvoscion: s-ro Hussain Saranjam, P.O. Box 34-277, Tehran, Irano.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtgirkonto Hamburg 150 58-209.

Ŝparu ĉe UEA! La unuaj membroj, kiuj faris fiksdatan mondeponon ĉe UEA, jam ricevis la 6-procentan renton por la unua deponjaro. Ankaŭ via mono povas doni al vi renton de 6% en guldenoj. Samtempe vi helpas la Asocion. Petu la regularon ĉe la Centra Oficejo.



Mi estas 26-jara usona framasono. Mi treege interesiĝas pri la mezepoka franca religio nomita "katarismo" (en la franca: "Catharisme"). Mi tre deziras kontakti iujn, kiuj interesiĝas pri ĉi-mezepoka kristana sekto. Mi deziras ankaŭ korespondi kun junvirinoj el la tuta Eŭropo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Sud-Afriko kaj Kanado. Miaj aliaj interesoj estas: historio, muziko, literaturo, scienc-fikcio, mondpaco, pacifismo kaj korespondado. Bill Brawner, 4040 Union St., Columbus, GA 31903, Usono.




*Alberta
Casey
vokas*

al San Diego

GRAMOFONDISKO "SAN DIEGO VOKAS"

Post la sukceso de
sia unua disko
"Al vi de mi" (kiu
baldaŭ elĉerpiĝos)
Alberta Casey nun
venas kun nova
grandformata
disko, kun 13 tre
konataj kantoj.
Prezo: 36,00 gld.
Mendu ĉe UEA!



Ĉu vi biciklas? Nu ja, eble iom sporte aŭ por amuzo. Sed certe vi ne jam biciklis de Francio al Vladivostoko, tra Japanio kaj Ĉinio. Tiun mirigan vojaĝon tamen faris homo, tiam juna: Lucien Peraire, franca esperantisto, dum la 20aj jaroj bicikladis tra Eŭrazio. Ekde januaro 1982 li rakontas pri la amasaj aventuroj kaj travivaĵoj, spertoj kaj mirigaĵoj de sia vojaĝo

BICIKLE TRA EŬRAZIO

en nova artikol-serio en MONATO. Ne maltrafu ĉi tiun streĉan, interesan, instruiĉan kaj foje ankaŭ amuzan legaĵon! Tuj abonu. . .

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provexempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

EL POPOLA ĈINIO

**BONA INFORMO
20% DA RABATO**

La abonvarba kampanjo de *El Popola Ĉinio* por 1982 jam komenciĝis. Ekde la 1-a de novembro 1981 ĝis la 28a de februaro 1982 estas ĝia periodo kaj dume farante abonon al la gazeto oni povas profiti 20% da rabato el la abontarifo. Ne perdu la ŝancon, tuj abonu kaj varbe abonigu viajn parencojn kaj amikojn! Kiel abonvarbanto vi povos ricevi el Ĉinio rekompencajojn. Se vi unufoje sukcesis varbi 4 abonantojn vi do povos ricevi unu pecon de "libro-kupono" kiel donacon. La kupono valoras US\$5.00 por peco.

Abontarifo:

(abonperiodo)	(la aktuala prezo)		
1 jaro (12 n-roj)	£3.00	US\$ 6.00	Gld. 12,60
2 jaroj (24 n-roj)	£5.00	US\$10.00	Gld. 21,00
3 jaroj (36 n-roj)	£7.50	US\$15.00	Gld. 31,50

Abonu ĉe: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando (poŝtĉekkonto 37 89 64). **Nederlandaj klientoj** bonvolu aldoni 4% por la enlanda imposto. Abonebla ankaŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Petu prospektojn kaj specimenojn de Guoji Shudian!

"Ĉi tiu portreto de Zamenhof estas tiel bela kaj tiel majstre teksita, ke mi kredas neniam antaŭe esti vidinta pli ravan bildon de la aŭtoro de Esperanto." Tiel diras unu el la multaj ĝisnunaj aĉetintoj de la silka portreto de d-ro Zamenhof.



*La plej bela
portreto
de Zamenhof*

SILKA PORTRETO DE D-RO ZAMENHOF:

Tre delikate teksita per blanka kaj nigra silkaj fadenoj. Kun aŭtografo. Borderita. **Facile enkadrigebla** aŭ alimaniere pendigebla. Formato: **28x42cm**. Eldonis: Ĉina Esperanto-Ligo, 1980. Prezo ĉe la Libroservo de UEA: 9,00 gld. (Triona rabato por la aĉeto de tri ekzempleroj)

ĈEFVERKO DE LA MONDA LITERATURO, FAMA PORTUGALA EPOPEO, NUN EN ESPERANTO:

La Luzidoj

”Leopoldo H. Knoedt, jam konata pro elstaraj redonoj el la brazila, kiel *Elektitaj poemoj* de Castro Alves, faris majstran, inspiro-plenan rekreon. Lia versio de *La luzidoj* gajnis al si la rajton stari sur la plej alta supro de nia traduka beletro — apud *La infero*, apud *Bapto de caro Vladimiro*, apud *Reĝo Lear* kaj *La tempesto*, apud *Kalevala*, apud *Aniario*.”

Fernando de Diego

CAMÕES

La luzidoj (1572), Luiz Vaz de Camões (1524-1580). El la portugala trad. Leopoldo H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1980. 464p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 14. Prezo: 43,20 gld., plus sendokostoj kaj 4% da imposto (por Nederlando). **Mendu ĉe UEA!**

Nur la plej bonaj humuristoj sukcesas venki la limojn de lingvoj kaj landoj. La israela verkisto Kiŝon estas unu el ili, ĉar liaj satiroj kaj teatraĵoj jam aperis en 26 naciaj lingvoj.



EFRAIM KIŜON

ELEKTITAJ SATIROJ

”Nafto el pampelmusa suko”, ”Kleptofilatelio”, ”La mondrekordo pri stulteco”, ”Telefonofobio”, ”Nov-Jorko ne estas Usono”, ”Asimiliĝo per televid-ekrano” — jen nur kelkaj el trideko da satiraj tekstoj, kiuj konsistigas la unuan prezenton de Kiŝon al la Esperanta legantaro.

Elektitaj satiroj, Efraim Kiŝon (1924-). Esperanta traduko de Gerhard Ziegler. Gerlingen: Bleicher Verlags-KG, 1981. 111p. 19cm. ISBN 3-88350-502-1. Prezo: 16,80 gld., plus sendokostoj. Por ĉiuj libroj de Bleicher Eldonejo la Libroservo de UEA donas trionan rabaton ekde 3 ekzempleroj.

**Bleicher
Eldonejo**

Postfach 100 123
D-7016 Gerlingen
FR Germanio

HIROSIMA-NAGASAKI

Bilda Dokumento pri la Atombombado

estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. La Eldon-Komitato bedaŭras, ke la limigita kvanto, kiu restas, devas vendiĝi anstataŭ la antaŭa senpaga distribuado.

Hirosima-Nagasaki: Bilda dokumento pri la atombombado (1978). El la japana trad. diversaj. Tokio: Eldon-Komitato por Hirosima-Nagasaki, s.j. (1979). 344p. Ilus. 29cm. Bindita. Luksa eldonaĵo kun fotoj kaj pentraĵoj, iuj koloraj, kun raporto kaj poemoj pri la du atakoj per atombombo en 1945. Prezo: 129,00 gld., plus sendokostoj kaj la kutima imposto de 4% por la nederlandaj klientoj.

IAM KOMPLETIGOTA PLENA VERKARO DE L.L. ZAMENHOF – FELIĈE JAM APERIS:

1 unuaj libroj por esperantistoj
1887~1888

1bis la inkunabloj de esperanto
1887~1889

2 ni laboru kaj esperu!
1887~1891

3 antaŭen al la laboro!
1892~1895

4 tamen la afero progresas!
1896~1900

5 hebreo el la geto
1859~1901

6 kun gradaj paŝoj eksterlanden!
1901~1904

7 klopodis organizi, sed vane!
1905~1906

8 por kaj kontraŭ reformoj!
1907~1908

9 mortinta, sed senmorta!
1909~1917

Mendu ĉe UEA, JEI, KLEG! Unu volumo 36 gld.

Stelo-kurzoj en 1982

Referencovaluto: la sveda krono. Je la 1a de jan. 1 STELO egalvaloros en '82 al 1,40, en '83 al 1,85 skr. En la *n*-a tago de '82 1 STELO egalvaloros al $[1,40 + 0,45(n-1)/365]k/v$ unuoj de la valuto *V*, en kiu formulo *k* kaj *v* estas la mezumoj de la kambiaj aĉeto- kaj vendokurzoj (en kiu ajn valuto) de respektive la sveda krono kaj la valuto *V*. — **Universala Ligo**, Vosseveldlaan 16, 3768 GM Soest, Nederlando.